

revuo

esperanto

oktobro 1964

57-a jaro

n-ro 707 (10)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

- enhavo**
- 161 Preparoj por la Jaro de Internacia Kunlaboro
 - 162 Novaj respondecoj de la E-movado (Berg)
 - 164 Lingvoj en Afriko — afrika vidpunkto
 - 165 En Argentino propono pri deviga instruado
 - 166 Poeto de Kaŭkazo (150-j. datreveno Lermontov)
 - 167 El verkoj de Lermontov (tr. Gusev, Staritsky)
 - 168 Kion vi trovos en Japanujo (Nakagaŭa)
 - 170 Recenzoj
Antaŭkongreso Bruselo; Postkongreso
Leeuwarden
 - 173 Ricevitaj eldonaĵoj
Nekrologoj Neto, Della Savia
 - 174 Mallongaj novaĵoj
Nekrologo Stamatiadis
 - 175 Belartaj Konkursoj 1965: regularo
50-a Universala Kongreso, Tokio 1965
21-a IJK de TEJO, Ootu 1965
 - 176 La Juna Vivo: kongresraportoj 20-a IJK
 - 178 Esperanto en radio
Oficiala informilo n-ro 372
 - 180 Internaciaj Konkursoj 1964
Anoncetoj
- kovrilo**
- Sudmoravia regiono apud kastelo Vranov en Ĉeĥoslovakio, kie okazas ĉiujare someraj kursoj de Esperanto en "tendara urbo". Fotis d-ro František Kubica.
- bildojn liveris**
- 166 Gazetagentejo Novosti, Moskvo
 - 168 Japana Nacia Turisma Asocio
 - 172 Kees Scherer

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

esperanto
oktobro
1964

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

Ekzultigas la preparoj por la Jaro de Internacia Kunlaboro

ĉefartikolo

En la momento de ekspreso restas ankoraŭ iom pli ol tri monatoj ĝis la komenciĝo de la Jaro de Internacia Kunlaboro proklamita de Unuiĝintaj Nacioj. Kiam tiuj ĉi frazoj atingos la plej forajn legantojn de "Esperanto", tiam la Jaro estos multe pli baldaŭa. Sed nenie, kie oni parolas la Internacian Lingvon, estas tro frue por komenci sian kontribuon al la agado organizata de UEA tra la tuta mondo. Tiu agado estas jam disvolvata kun plena energio, ĉar la tempo je nia dispono — eĉ tuta jaro — estas reale tre mallonga por atingi vere imponajn rezultojn. Ĉifoje ne utilas pensi, ke "prokrastita ne estas perdita", ĉar venas la momento, kiam tiaj sentencoj ne validas.

Feliĉe, la ĝisnunaj reeĥoj al la unuaj alvokoj de UEA aŭguras pozitive. Ŝajnas, ke ĉiuj organizaĵoj kaj individuoj bone komprenis la urĝecon kaj gravecon de la nuna kampanjo. Ĝi estas tia, ke nur sufiĉe imponaj atingoj havas ian sencon. Sekve, se la movado en tia momento ne agas unuece, pli bone estus tute nenion entrepreni. La ĉefa ero de la programo — la kolektado de subskriboj por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj — postulas aparte urĝan aktiviĝon de ĉiuj niveloj de la movado. Ne temas, kiel temis por la Peticio prezentita al Unuiĝintaj Nacioj en 1950, pri plurjara periodo, dum kiu oni iom post iom amasigus grandan nombron da subskriboj. Temas pri unu jaro — kaj tamen dum tiu unu jaro necesas streĉi ĉiujn fortojn por atingi, ke la nova Propono havu kiel eble plej solidan apogon.

Ĝisnunaj rezultoj

Kvankam ankoraŭ ne finiĝis la prepara periodo rilate la Proponon, jam diverslande komenciĝis la kolektado. Kvankam la naci-lingvaj tekstoj estas en diversaj landoj ankoraŭ ne finpresitaj, multaj individuoj kaj kluboj laŭ propra iniciato sukcesis plenigi kelkajn foliojn per subskriboj. Ĝis la 7-a de septembro jam atingis la Centran Oficejon ĉirkaŭ 1900 subskriboj individuaj el 16 landoj. Plej multe kontribuis ĝis tiam Francujo (per pli ol la kvarono), Ĉeĥoslovakio kaj Nederlando, sed ankaŭ el Brazilo, Argentino, Aŭstralio alvenis la unuaj subskriboj. Inter la individuoj subskribintaj troviĝas, krom pluraj parlamentanoj kaj urbestroj, prof. Maurice Fréchet, membro de la Sciencaj Akademioj en Francujo, Pollando kaj Nederlando. Ankaŭ dudek organizaĵoj en ok landoj, kun entute ĉ. 63 000 membroj, ĝis nun subskribis.*

Nun ĉiuj kondiĉoj pretiĝas por la ĉefa antaŭensalto de la kolektado. La folioj por subskribo, senditaj specimene kun la junia eldono de "Esperanto", estas senpage riceveblaj ĉe UEA kun surprisitaĵ tekstoj esperanta, angla,

franca, hispana kaj nederlanda. Dank' al kunlaboro de la koncernaj landaj asocioj, ili estas presataj kaj jam mendeblaj surloke, ankaŭ en la lingvoj bulgara, finna, germana, hungara, itala, serba-kroata, slovena kaj sveda. Pri presigo en aliaj lingvoj ni informos kiel eble plej baldaŭ. El pli ol 100 000 subskribo-folioj presitaj ĉe UEA, jam ĉirkaŭ la duono estas distribuitaj al landaj asocioj, kluboj kaj individuoj. Ni ankoraŭfoje urĝe alvokas al ĉiuj organizaĵoj, landaj kaj lokaj, kiuj ĝis nun ne entreprenis distribuadon kaj eventuale presigon aŭ almenaŭ multobligon de nacilingva traduko de la Propono, tuj mendi la bezonatan kvanton el la Centra Oficejo. Necesas aparte prizorgi, ke en ĉiu pli granda renkontiĝo aŭ kongreso de esperantistoj estu riceveblaj la propon-folioj kun surpriso en la ĝusta lingvo.

Por kolektantoj

Al la kolektantoj ni konsilas unue tre zorge tralegi la instrukciojn presitajn sur la propon-folioj. Jam alvenis kelkaj folioj, kiuj pro tiu aŭ alia eraro estis nevalidaj. Tio aparte koncernas la subskribojn de organizaĵoj. Kompreneble ne havas signifon la subskribo de iu instanco, kies membroj *ne estas libervole aliĝintaj*. Urbestro, ekzemple, povas en sia propra nomo subskribi, sed ne en la nomo de ĉiuj urbanejoj. Same, lernejestro ne rajtas subskribi proponon kiel deziresprimon de ĉiuj lernejoj. Sed ju pli da urbestroj, da profesoroj, parlamentanoj, eĉ ŝtatestroj kaj aliaj eminentuloj aliĝas al la Propono, des pli forte ĝi postulos la atenton de Unuiĝintaj Nacioj. Gravas kaj kvanto kaj kvalito. Unuavice, kompreneble, oni klopodu akiri denove la subskribojn de tiuj eminentuloj, kiuj en antaŭaj okazoj donis sian apogon al la Internacia Lingvo. Poste, akirinte tiujn, ni disponos pri ankoraŭ unu argumento por varbi aliajn. Ĉar ĉiuj subskriboj devos esti liveritaj al la C.O. ĝis oktobro de 1965, plej malfrue, prokrasto signifus nulan rezulton.

En la Esperanto-gazetaro aperis jam pluraj informoj kaj artikoloj pri la Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK) kaj pri la Propono al UN. Tiu gazetara aktiveco kompreneble multe kreskos en la venontaj monatoj. Interalie aperos baza prelego-teksto pri Unuiĝintaj Nacioj kaj pri la JIK, adaptebla por mezlernejoj, societoj, k.a. medioj. Tiaj bazaj materialoj estu uzataj en kombino kun nacilingvaj materialoj riceveblaj de la regionaj informoj de UN. La celo estas ĉiam duobla: prezenti, en la sama kadro de JIK, la laboron de UN al la esperanta publiko, kaj la kernan obstaklon al internacia kunlaboro — la lingvan problemon — al la cetera publiko. En la ekstera informado la Propono al UN, pri kies stato kaj progresoj ni de nun regule raportos en "Esperanto", devas havi centran rolon.

Diskon
igu la
Jaron
de
Inter
nacia
Kunla
boro
je 24
okt.:
Tago
de
Unui
ĝintaj
Nacioj

* Lastmomente: ĉ. 2500 individuoj el 21 landoj, kaj 27 organizaĵoj en 11 landoj kun entute ĉ. 100.000 membroj.

Novaj respondecoj de la Esperanto-movado

Inaŭgura parolado de prof. C. C. Berg, Rektoro de la Internacia Somera Universitato, Hago, 2-7 aŭgusto 1964.



Kiuj estas hodiaŭ la plej urĝaj aspektoj de la lingva problemoj? En kiu direkto tiu problemoj evoluas? Kiaj estas la lingvaj bezonoj de la novaj ŝtatoj de Azio kaj Afriko? Kiun rolon trovas la Internacia Lingvo en tiuj kontinentoj? Tiajn demandojn tuŝis la nunjara Rektoro de ISU, prof. Berg, en sia pensiga inaŭgura parolado. Prof. Berg, kiu komencis sian karieron en la iama Nederlanda Orienta Hindio, studinte la sanskritan kaj arabajn lingvojn kiel la pordojn al hindua kaj islama kulturoj, hodiaŭ estas rekonita kiel unu el la plej grandaj sciintoj pri la lingvoj kaj popoloj de Indonezio. Kiel tia li konas tre profunde la problemojn, kiujn kaŭzas la diverseco de la lingvoj en tiu mondoparto. D-ro Berg estas, interalie, profesoro pri aŭstronezia lingvistiko en la Universitato de Leiden, Nederlando, eksterordinara profesoro pri la indonezia lingvo en la Urba Universitato de Amsterdam, membro de la Reĝa Nederlanda Scienca Akademio, kaj estrarano de la Nacia Komisiono por Unesko.

Estimataj gesinjoroj,

Ĉi tiu Kongreso de homoj, kiuj fidis al Esperanto kiel internacia komunikilo, okazas en jaro de la homa historio, kiam estas pli urĝa ol iam antaŭe la demando, kiel trovi novajn kaj pli bonajn rimedojn de internacia komunikado. Estas vere, ke tion oni povus diri en la jaro 1954, kaj mi supozas, ke ĝi estos same valida en 1974. Tio pruvas, ke la aserto estas aktuala, laŭ la pli larĝa senco de tiu vorto. Kelkaj asertoj estas tiaj, ke necesas ĉiam denove ripeti ilin. Ĉi tiu kunveno verŝajne atingos la atenton ne nur de la esperantistoj, sed ankaŭ de kelkaj aliaj personoj, kiuj povas demandi al si, por kio oni okazigas tian kunvenon, kaj kial necesas aldoni al la kongresa programo ian universitatan prelegaron. La ĵusa aserto pri la urĝa bezono de novaj solvoj de la problemoj de internacia kompreno estu inspiro al la esperantistoj, kaj pensigu la ne-esperantistojn.

Cu la jaro 1964 estas aparte rimarkinda tiurilate? Iasence, jes. La frazo "internacia komunikado" havas du signifojn, pro la du signifoj de la vorto "nacio": unuflanke, "nacio" signifas lingvan komunumon, aliflanke ĝi estas ofte uzata por signifi ŝtaton. En la mondo de 1964 ekzistas same tiom da lingvaj komunumoj, verŝajne, kiel en la jaro 1954: ni diru 3000 aŭ 4000 aŭ eble eĉ pli multaj, ĉiuokaze konsterne granda nombro. Niaj kunhomoj, kiuj parolas la plimulton el tiuj lingvoj, estas preskaŭ tute izolitaj disde la cetera mondo pro la fakto, ke iliajn lingvojn neniu komprenas ekster la malgranda grupo de 500 aŭ 1000 aŭ eĉ 10.000 parolantoj. La anoj de tiuj etaj lingvaj komunumoj estas viktimoj de la procesoj de la homa evoluo, — procesoj, kiuj rezultigis la diversecon de lingvoj kaj kulturoj, sed ankaŭ la grandajn atingojn de civilizo, pri kiuj fieras la homaro. En ĉi tiu lando, kie ni kunvenas, la popolo iom post iom lernis, ke ĝi prizorgu la bonfarton de tiuj, kiuj estas handikapitaj en la lukto pri vivo kaj feliĉo. Same, en la pli granda komunumo de nia planedo ni devus prizorgi la bonfarton de tiuj, kiujn handikapis la fakto, ke ili naskiĝis en malgranda lingva komunumo kaj edukiĝis inter mallarĝaj kulturaj horizontoj. Esperanto estas unuavice idealo, la idealo de unuigo de la tuta homaro en unu supernacian lingvan komunumon, kiu disponas pri la tuta trezoro de civilizo. Estas tiu idealo, kiu vivis en la koro de la nobla fondinto de via monda movado, kiu vivas hodiaŭ en la koroj de la milionoj da liaj sekvantoj, kaj kiu sendube vivos en la koroj de multaj estontaj generacioj. Nuntempe la problemoj de la handikapitaj lingvaj komunumoj ne estas ankoraŭ solveblaj, sed por trovi solvon necesas unue

kompreni la faktojn, kaj kompreni la respon-
decon, kiun tiuj faktoj ŝajne trudas al ni.

Multe pli praktika afero estas la evoluigo
kaj faciligo de komunikiloj inter la ŝtatoj.
Tiurilate la hodiaŭa situacio en la mondo estas
rimarkeble malsama ol tiu de antaŭ dek jaroj.
En la lastaj jaroj rapide kreskis la nombro
de la ŝtatoj, kiuj kunlaboras en Unuiĝintaj
Nacioj kaj en ties fakaj organizaĵoj: Unesko,
la Monda San-Organizo, FAO, ILO kaj multaj
aliaj. Tiu nombro kreskis de ĉirkaŭ 50 ĝis pli
ol 100. Personoj, kiuj havas okazon ĉeesti la
ĝeneralajn konferencojn de tiaj organizaĵoj,
povas ricevi la impreson, ke la delegitoj inter-
ŝanĝas siajn opiniojn sufiĉe glate en tiu aŭ
alia el la kvar kvin lingvoj, kiuj akiris inter-
nacion rekono. Efektive, estas ofte plezure,
aŭskulti delegitojn de ĉiu haŭtkoloro kaj kos-
tumo, kiuj esprimas siajn ideojn en lingvo,
kiun ili eklernis nur en lernejo, kaj tamen flue
parolas. Sed kiom da aliaj delegitoj restas
silentaj, nur pro tio, ke ili ne parolas flue la
rekonitajn lingvojn, kvankam ili eble povus
same grave kontribui al la debato? Krome, ni
nun vivas en la unuaj jaroj de la tiel nomata
periodo de senkoloniigo; la gvidantoj de multaj
afrikaj aŭ aziaj ŝtatoj bone lernis la uzadon
de la angla aŭ franca lingvo, kiam ili kiel
infanoj vizitadis lernejojn establitajn de
kolonia potenco. Tiu situacio estos tute alia,
kiam finiĝos la vivo de la nuna generacio, ĉar
sendependiĝo estas la unua paŝo direkte al la
ŝtatigo de diversaj institucioj, inkluzive de la
lerneja sistemo. Tiaspeca evoluo estas jam
klare videbla en kelkaj aziaj ŝtatoj, kie la
anglan aŭ francan lingvon anstataŭas aliaj
lingvoj, kies nomoj estas apenaŭ konataj en
ĉi tiu parto de la mondo. Mi rekomendas al
vi la libreton de Profesoro Le Page: "La pro-
blemo de naciaj lingvoj" (The National Language
Question), eldonita en 1964; eble oni povus
eldoni ĝin ankaŭ en Esperanto.

Bezonoj de la malriĉuloj

Ĉu ni kulpigu la gvidantojn de aziaj kaj
afrikaj ŝtatoj pro tio, ke ili emfazas la ega-
lajn rajtojn de la propraj lingvoj, eĉ se ilian
politikon foje karakterizas ia fanatikismo?
Povas esti bedaŭrindaj tiuj naciismaj sentoj,
kiuj forigas el la lerneja programo pli disvasti-
gitajn lingvojn, kiuj jam posedas radikojn en
la socia vivo de la koncerna lando. Necesas
tamen klare kompreni, kia estas la problemo,
kiun frontas Nasser en Egiptujo, Shastri en
Hindujo, kaj aliaj. Ĉu ili povus alporti al la
vastaj grupoj da malriĉuloj la benojn de
modernaj scioj, se ili konservus en siaj lerne-
joj lingvon, kiun la malriĉuloj ne komprenas,
kaj por kies lernado ili havas nek monon nek
tempon nek la elementan instruitecon? Sendep-
endigan militon plej ofte sekvas socia revo-
lucio, kaj tia socia revolucio fontas el la bezo-
noj de la malriĉuloj, kaj evidentigas multajn
aliajn bezonojn, kiuj estis eĉ nekonataj por la
regantoj. Tiuj nunaj regantoj simple ne havas
alternativon.

Mi opinias, ke neniuj povas esti bona Espe-
rantisto, kiu ne interesiĝas pri la problemoj,

kiujn frontas la hodiaŭa mondo, kaj kiu ne
komprenas, ke en multaj kazoj la plej rekta
vojo al plibonigo de la vivo-cirkonstancoj de
milionoj da homoj ne povas esti ankoraŭ la
vojo de Esperanto. Esperanto ne solvas ĉiun
ajn malbonaĵon sur la kampo de komunikado.
Aliflanke, ĝi ja solvas iujn malbonaĵojn, kaj
ĝi ja povus doni bonegan kaj grandegan hel-
pon en iuj medioj, eĉ en tiuj ŝtatoj, kie la
evoluigo kaj normigo de nacia lingvo estas
urĝa problemoj. Mi volus eĉ sugesti, ke —
precipe en tiaj landoj, kie la plej urĝa tasko
estas la evoluigo de nacia lingvo kiel instru-
lingvo por la larĝaj tavoloj de la popolo, — la
enkonduko de unu simpla internacia lingvo
en mezlernejojn, kolegiojn kaj universitatojn
povus multe faciligi la efektivigon de naciaj
ambicioj, ĉar unu simpla internacia lingvo
estas la plej malmultekosta fenestro, kiun oni
povas malfermi al la ekstera mondo.

Konscio pri internaciaj problemoj

Mi pardonpetas, ĉar mi tiel longe pritraktis
en ĉi tiu inaŭgura parolado la problemon de
la evoluantaj landoj. Iasence, mi nur sekvis
la modon de nia epoko, sed mi konjektas, ke
diskuto pri tiuj problemoj aparte interesas
vin, kaj ĝi certe havas specialan intereson en
la nuna jaro 1964. Ke mi traktis nur unu
problemon, tio ne signifas, ke la temoj, kiuj
okupas vin en la aliaj kunvenoj estas malpli
gravaj. Ĉar kion fine signifas "malpli gravaj"?
La evoluantaj landoj ne estas ia absoluta
fenomeno, sed ili estas fenomeno de mondo,
en kiu ekzistas diversaj vivo-cirkonstancoj.
La problemoj de la evoluantaj landoj estas
grandparte la problemoj de la alte evoluantaj
landoj, kiuj nun ekkonscias pri tute nova tasko
kaj tute novaj respondecoj. Se ni mezuras
la nivelon de evoluo per la nivelo de konscio
pri internaciaj problemoj — kaj tiu ŝajnas
al mi sufiĉe bona mezurilo, — do via organi-
zaĵo apartenas al la alte evoluintaj partoj de
la mondo, tiel ke ankaŭ ĝi devas partopreni
la novan taskon kaj la novajn respondecojn.

Movado, kia la via, devis komenci per iom
da juneca entuziasmo. Ĝi ne estus sukcesinta,
se tiu entuziasmo ne estus iom junuleca kaj
eĉ infaneca. Nun, tamen, Esperantismo atingis
sian maturecon, kaj tiu matureco postulas
maturan entuziasmon, imuna kontraŭ ŝtormoj.
Ŝtormimuna ĝi estu, ĉar nia mondo en 1964
ne estas kvieta loĝejo; tute male, ĝi abundas
je ekscitaj eksplodoj kaj ventegoj. Nun, egale
kiun vojon prenu la homaro — ĉu la vojon de
kruda perforto, ĉu tiun de penaj intertraktoj —
neniun pli bonan mondon ni atingos, se ni ne
perbatalos ĝin: nur, ni esperu, ne per la bata-
liloj de barbaroj. Vi, estimataj kongresanoj,
kunvenis ĉi tie por prepari strategion por paca
kunekzisto, por prepari, aŭ helpe prepari,
lingvo-programon ĝenerale aplikeblan. Laŭ
la naturo mem de via organizaĵo, vi estas
pretaj por batali, ĉar tio, kion Zamenhof volis
atingi, estis io eksterordinara. Akceptu miajn
bondezirojn, kaj mian esperon, ke precipe tiu
ĉi universitata parto de via kongresa programo
estu plene sukcesa.

Ekzistas fundamentaj diferencoj de opinio pri la metodoj aplikendaj por progresigi la Internacian Lingvon en la landoj de Afriko. Sed ke tiu kontinento meritas apartan atenton, tion preskaŭ ĉiu konsentas.

En la revuo "Esperanto" de junio 1964, S-ro H. Tonkin aperigis artikolon pri la esperantista agado en Afriko, titolitan "Lingvoj en Afriko: Laikula vidpunkto".

Estante esperantisto de 21 jaroj, kaj afrikano de 16, mi ne povas lasi tiun artikolon sen komentario, pri la formo kaj pri la fundo.

1e) Pri la formo: Estas la esperantisto kiu respondas. Kial tiu agaca, supereca, malagrabra tono? La meza esperantisto havas *nubojn en la kapo*, estas *naiva* (plurfoje dirita), li ne bone komprenas aŭ konscias, estas kredema, delire babilas...

2e). Pri la fundo: Nun estas la afrikano kiu respondas. En sia enkonduko S-ro Tonkin bone starigis la problemon: klare difini celon, konsiderante la faktajn malfacilaĵojn.

Sed la viditaj malfacilaĵoj ne ŝajnas al mi determinaj, kaj el ili ne klare fontas ia konkreta "klare difinita celo". Ĉar ĉu estas realisma konkludo tiu alvoko al "scienca studado"? Ĉu vere la amaso da studoj jam faritaj de centoj da specialistoj de unu jarcento pri la afrikaj lingvoj ne sufiĉas? Ĉu vere estas necese difini lingvon, dialekton, fiksi ilian nombron, la nombron de parolantoj, starigi specialajn pedagogiajn metodojn, fari klerajn studojn ktp... por fruktodone labori por la Internacia Lingvo en Afriko?

Ĉu la esperantistoj devos plenigi la mankojn eventuale lasitajn de la lingvistoj, pedagogoj, sociologoj, kaj atendi la nuligon de tiuj mankoj antaŭ ol konkrete eklabori?

Ni restu sur la tero! Ĉar mi kritikis, mi ŝuldas miavice konkretan proponon. Jen do kion mi estus dirinta surloke de S-ro Tonkin, ekde lia bonega ekirpunkto:

a) Jen la malfacilaĵoj:

— Malriĉego: Estas neeble trovi surloke financajn rimedojn por informado kaj funkciado de grupoj. La plimulto ne povas aĉeti importitajn lernolibrojn, vortarojn, diskojn, aboni gazetojn, aliĝi al asocioj, korespondi eksterlande,... Meza afrikano gajnas dekfoje malpli ol meza eŭropano, en lando kie la prezoj estas dufoje pli altaj. Leterafranko al Eŭropo reprezentas kvinonon da labortago. Jara kotizo al U.E.A. kiel membro abonanto egalas kvaronon de la monata salajro de la privilegiitaj laborpose-dantoj.

— Malalta klerecnivelo: Tio estas malhelpo nur por kvanta varbado, sed neniel netransi-rebla obstaklo. Ni devas konsideri ke la "utila" loĝantaro de iu lando, sumiĝas je la klera frakcio de la fakta loĝantaro; krome, "klera", preskaŭ ĉiam signifas "kiu konas eŭropan

Lingvoj en Afriko: afrika

lingvon" (kun escepto por arabaj landoj). Se ni limigas niajn klopodojn al la kleruloj (kaj kiel kaj kial fari alimaniere), ne ekzistas speciala problemo pri metodoj.

— La farenda laboro por ekonomia disvolviĝo estas terura: Ĉiuj fortoj devus esti streĉitaj al tiu disvolviĝo, kiu devus esti, kaj parte estas, la nura okupaĵo de la landestraroj. Tial, esperanto estos ofte supraĵe traktata, kiel flankafero por kiu la nacio ne devas dediĉi eĉ iomete de siaj fortoj kaj tempo. Mi mem foje sentis ke mi preskaŭ faris malbonan faron, instigante iun kleran afrikanon al esperantolernado, kiam liaj samlandanoj estas senlaboraj, malsataj, malsanaj, analfabetaj...

— La afrikanoj kaj precipe la plej kleraj, havas kelkajn apartajn karakterizojn, klarigeblajn de la ĝenerala malriĉeco, kaj grandega kaj freŝdata bezono pri naciaj elitoj. Temas pri socisukcesavido, kiu forlogas de ĉio, kio ne alportas tujan profiton; ekzistas ankaŭ supraĵa lerneja juĝemo, kaj malkuraĝo kaj malŝato antaŭ novaj, originalaj, ideoj kiuj povas rimarkigi, distingi. Oni ja diros ke estas same ĉiuloke; tamen venas momento kiam kvanta ŝanĝo okazigas kvalitan ŝanĝon.

b) De ĉio tio, mi kredas ke la esperantistaro povas tiri la jenan celon por sia agado en Afriko. Ni forviŝu ĉiun utopian esperon ke Afriko povos montri la vojon al la mondo iagrade oficialigante Esperanton. Ĝia ekonomia, klereca, kaj morala stato ne permesas al ĝi tian pioniran, vojmontran rolon.

Sed ni ja povas limigi nian ambicion al alvenigo de Afriko sur nivelon iom kompareblan kun tiu de Eŭropo, Ameriko, aŭ Japanujo, rilate la Esperanto-movadon. Ni povas aperigi Afrikon sur la scenejon de la monda esperantista movado. Ni atendu de tio nur certagradan plifortiĝon kaj pliinternaciigon de U.E.A., sed neniel decidan paŝon.

Kiel tiun limigitan celon realigi? Kiel ĉie, estas bezonataj homoj por labori, kaj mono por pagi.

— Estas tri eblaj fontoj de homoj:

- Instruado al afrikaj studentoj en la eŭropaj universitatoj;
- Helpo, kuraĝigo kaj alvoko al la jam surlokaĵaj esperantistoj (vidu la jarlibron), aŭ privata elmigro por du tri jaroj de bonvoluloj kiuj havus la eblecon vivgajni en Afriko;
- Specialaj senditoj.

Miaopinie, nur la du unuaj fontoj ion valoras. (Tie ankaŭ mi povus detaligi).

— Ununura fonto por mono: Eksterlando. Ĉu

UEA, ĉu speciala donacfonduso, ĉu ĝemeligo de asocioj... se oni juĝas ke la afero valoras la penon.

Dudeko da bone dissemitaj agemuloj povus en dek jaroj krei dudekon da naciaj asocioj de 50 ĝis 100 membroj kaj formi centon da bonaj esperantistoj. La labormetodoj devas esti la samaj kiel ĉiuloke: informado, publikaj kursoj, kreo de asocioj, sieĝo de la ministraj kabinetoj... Ne povas ekzisti privilegia vojo por akiro de la lingvo aŭ de estra pozicio. La metodoj kiuj iagrade sukcesis en la evoluintaj landoj devas sukcesi ankaŭ en subevoluintaj.

Henri ROUSSEAU, Delegito de UEA en Pointe Noire, Kongo.

RESPONDE AL S-RO ROUSSEAU

Kompreneble s-ro Rousseau havas pli grandan sperton pri Afriko, ol mi — pro tio mia insisto pri la propra laikeco. Se mia tono estis supereca, mi tion bedaŭras, sed s-ro Rousseau devas pruvi miajn tezojn eraraj, kaj ne mian tonon.

Mi ne celas sekajn akademiaĵojn, sed rekte utiligeblaj sciencaj studoj absolute necesas. S-ro Rousseau proponas la aplikon de tradiciaj varbmetodoj en Afriko; mi opinias necesa la enkondukon de Esperanto en la edukajn sistemojn de la koncernaj landoj, kaj por fari tion necesas studado pri celo kaj metodoj. La metodoj de s-ro Rousseau nur aldonas unu lingvon al tiuj jam ekzistantaj — kaj se ili dependas de la livero de sindediĉemaj eŭropanoj al Afriko, mi dubas, ĉu ili sukcesos.

Mi ne diras, ke la meza esperantisto havas nubojn en la kapo, almenaŭ ne en la senco, kiun komprenas s-ro Rousseau, kaj mi certe ne diras, ke la meza esperantisto "delire babilas". Nombri la lingvojn en la mondo ja ŝajnas al mi delira babilado — kaj tion mi ne celas. Sed ja necesas "starigi specialajn pedagogiajn metodojn, fari klerajn studojn". Tio necesas kaj ankoraŭ necesas por aliaj studobjektoj (kiel la de mi recenzita libro daŭre emfazis), kaj do ĝi evidente necesas por Esperanto. Mia artikolo simple celis, ke homoj haltu momente, rigardu siajn metodojn, kaj elpensu denove siajn celojn. Por uzi la vortojn de s-ro Rousseau: "Ni restu sur la tero". Post profunda kaj tuja studado — io, laŭ mi, por kio la Esperanto-movado sufiĉe fortas — ni direktu niajn klopodojn al afrikaj registaroj. Mi kredas ke al taŭga propono, subtenata de faktoj, ili favore reagus.

Humphrey Tonkin.

En Argentino estas proponita deviga instruado de Esperanto



S-ro Luis Mendez, vic-prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj, Santa Fe, Argentino.


S-ro Luis Mendez, membro kaj vic-prezidanto de Ĉambro de Deputitoj de la Provinco de Santa Fe, prezentis leĝoproponon por la deviga instruado de la Internacia Lingvo en la du lastaj jaroj de la unuagrada kaj en la du unuaj jaroj de la duagrada lernejoj de tiu provinco. Pro la antaŭnelonga rompo de konstitucia ordo en Argentino, tiu propono, unue farita antaŭ du jaroj, ne povis pli frue ricevi pritrakton.

La aprobo de tiu leĝopropono signifus ke en pli ol 1000 lernejoj, Esperanto estus instruata ek de 1965-a al pli ol 200.000 gelernantoj, en provinco, kiu estas la dua je graveco en Argentino.

Ne necesas ke ni akcentu la sekvojn de la materialigo de ĉi tiu projekto, kiu donus eksterordinaran antaŭenpuŝon al Esperanto ne nur en Argentino sed ankaŭ en la tuta mondo.

La argentinaj esperantistoj laboras por krei la etoson adekvatan ne nur ĉe la Ĉambro de Deputitoj, sed ankaŭ ĉe la popolo por la apogo al ĉi tiu propono. Tamen nepre ili bezonas la helpon de la tutmonda esperantistaro, kaj por tio adresas al ĉiuj societoj, esperantistaj aŭ ne, individuaj esperantistoj, al ĉiuj; ke tuj per aerpoŝto sendu leterojn aŭ simplajn poŝtkartojn en Esperanto, apogante tiun leĝoproponon por havigi al la proponinto grandkvantan, ĉiulandan kaj imponan materialon, por pruvi nerifuteble la disvastigon de Esperanto kaj la multnombrecon de ties parolantoj. La projekto estos pritraktata tuj, tial ne hezitu kaj agu rapide. Sendu ĉion je la sekva nomo kaj adreso:

S-ro Deputito Luis Mendez, Iguazú 116, ROSARIO, Provinco Santa Fe, Argentino.



Poeto de Kaŭkazo

Du rusaj poetoj staras nemezureble pli alte, ol ĉiuj aliaj: A. S. Puŝkin (1799-1837) kaj M. Ju. Lermontov (1814-1841). Ambaŭ vivis preskaŭ en la sama tempo; ambaŭ estis mortigitaj dum la plej alta disfloro de la talento. Kaj se verkoj de Puŝkin frapas nin per sia mirinda beleco kaj facileco, versoj de Lermontov, eble ne tiomgrade perfektaj teknike, eĉ plie penetras en la animon de la leganto, ĉar ne multaj tiom konis profundojn de l' homaj sentoj, kiel junulo Lermontov.

Miĥail' Jŭrjeviĉ Lermontov naskiĝis la 15-an de oktobro (aŭ la 3-an, laŭ juliana kalendaro) 1814 j. en Moskvo, kaj pasigis sian infanaĝon en Tarĥany (Penza gubernio) — bieno de lia avino E. A. Arsénjeva. Lia patrino mortis, kiam li estis nur dujara, la patro malofte vizitis lin, kaj ĉiujn zorgojn kaj la edukadon prenis sur sin lia avino, ameganta la nepon. Jam en infanaĝo li ekvidis Kaŭkazon, kun kiu estis ligitaj poste la plej geniaj liaj verkoj. En 1832, pro kolizioj kun profesoroj, oni eksigis lin el Moskva Universitato; en la Peterburgo oni lin ne akceptis, kaj tial por la poeto restis nur militista kariero. En 1834 li finis kavalieran lernejon de junkroj kaj iĝis oficiro de gvardia husara regimento. Komence li servis en Peterburgo (nuna Leningrado), sed pro lia tre akra versaĵo "Al morto de Puŝkin", direktita kontraŭ tiama socio, li estis sendita en regimenton, batalantan en Kaŭkazo, al kugloj de montaranoj. En la sama 1837 jaro aperis la unua versaĵo, kiun Lermontov opiniis inda je publikigo — "Borodinó" — rakonto pri granda batalo kontraŭ napoleona armeo apud Moskvo en 1812. En 1838 li revenis el ekzilo,

sed lia ne tro respekta konduto (ĉu li povis respekti murdistojn de Puŝkin?) elvokis novajn koliziojn ĉe la cara kortego. Kontraŭ la granda rusa poeto komenciĝis intrigoj. Sekvis duelo, feliĉe sensanga, pro kiu Lermontov en 1840 estis denove ekzilita Kaŭkazon. Li ekloĝis en Pjatigorsko, por sin kuraci, sed en tiu kurorta urbeto kondiĉoj por intrigo estis aparte oportunaj. Ne estis malfacile trovi nesagan, sed sinamantan kaj ofendeman homon, kiu alkroĉiĝinte al io povus inviti lin al duelo. La 27-an de julio (15-an laŭ juliana kalendaro) de 1841, en aĝo de 26 jaroj, Lermontov estis mortigita.

Verkoj de Lermontov ne tre feliĉas en esperantaj tradukoj. Lia poezia ĉefverko — poemo "Demonio" — estis eldonita en 1894 en traduko de V. Devjatnin, kaj estis la unua provo de versa traduko de granda poezia verko; ĝi ne nur malnoviĝis lingve, sed ankaŭ tute ne transdonas la spiriton de la originalo. Poste (en 1912) estis eldonita proza traduko de "Demonio" (Kabanov), same nekontentiga. El la prozaj verkoj — "Princidino Mary", — la plej bona parto de lia romano "Heroo de nia tempo", havas saman sorton — ĝia traduko (E. de Wahl) estis eldonita en 1889-1896. La plej bona kolekto de versaj verkoj de Lermontov, kiu enhavas du liajn poemojn kaj multajn versaĵojn, ĝis nun restas libro de Bela Manto (B. Mirskij) — "Novaj versaĵoj", eldonita en 1912. Multaj belegaj kaj tre gravaj verkoj de Lermontov (Dramo "Maskarado", poemo "Mcyri" k.a.) ĝis nun estas esperantigitaj de neniu.

B. Tornado

El verkoj de Lermontov

Lermontov estis majstro tiel de rakonta poezio, kiel de pli mallongaj formoj. En la ĵus eldonitaj "Elektitaj versaĵoj" elstaras tiu ĉi dolĉamara.

"Tre ofte..."

Tre ofte meze de l'amas' kolora,
Dum antaŭ mi, kvazaŭ en sonĝo fora,
En karnavala bru' kaj brilo
Kun la sovaĝaj flustroj senesprimaj
Moviĝas la vizaĝoj senanimaj
Malicaj maskoj de ĝentilo,
Dum premas sin al miaj manoj fridaj
La fingroj de virinoj amavidaj,
Velkintaj jam pro amorfaroj, —
Mi kvazaŭ profundigis en la svarmon,
Sed en la koro lulas oldan ĉarmon —
La sonojn de l'mortintaj jaroj.
Kaj se mi min forgesas por momento,
Kiel libera birdo en la vento
Mi flugas al la tagoj karaj,
Mi vidas knabo min... La dom' patrina,
Ĝardeno kun oranĝeri' ruina —
La hejmaj lokoj pasintjaraj!
Verdigas dorman lagon la herbaro,
Kaj la vilaĝo fumas ĉe l'arbaro,
Nebuloj flosas en la valo.

Sur la aleo sombra trans folioj
Al mi rigardas lastaj sunradioj
Kaj flustras la foliofalo.
Kaj stranga tristo premas bruston mian,
Pro ĝi mi ploras kaj ĝin amas tian —
Verkitan per la revo kora,
Kun ties juna okulpardo blua,
Kun la rideto, kiel lumo frua
Super la gaja bosk' aŭrora.
De l'reva regno mastro ĉionpova,
Dum longaj horoj sidis mi senmova,
Kaj en memoro floras ili
Sub ŝtormoj de pasioj kaj amaroj —
Kiel insulo freŝa en la maro
Ne ĉesas per la floroj brili.
Sed kiam pri la tromp' konscio venas,
Kaj kiel nevokita gast' forsvenas
La revo en la bru' barbara,
En la okulojn mokajn kaj malverajn
Mi tiel volus ĵeti versojn ferajn
Verŝitajn per koler' amara!

Tradukis
K. Gusev

El novelo "Bela"

Por signi la datrevenon, UEA ĉijare eldonas volumeton "Kaŭkazaj rakontoj" de Lermontov. Inter la streĉaj aventuroj jen poezia natursceno.

Dume la teo estis trinkita; jam delonge jungitaj ĉevaloj tremfrostiĝis en la neĝo; la luno paliĝis en la okcidento kaj estis jam preta subiĝi en la nigraj nuboj, pendantaj sur malproksimaj montopintoj, kvazaŭ pecoj de disŝirita kurteno. Ni eliris el la kabano. Spite al la antaŭdiro de mia kunvojaĝanto, la vetero sereniĝis kaj promesis al ni kvietan matenon; la stelovicoj kvazaŭ en rondodanco interplektiĝis sur la malproksima firmamento, kaj unu post la alia estingiĝis, dum la blankeca rebrilo el la oriento disverŝiĝis laŭ malhel-violkolora ĉielkupolo, grade lumigante krutajn montdeklivojn, kovritajn per virga neĝo. Dekstre kaj maldekstre nigriĝis misteraj abismoj, kaj la nebuloj, buliĝante kaj tordiĝante kiel serpentoj, malsuprenrampis en ilin laŭ la najbaraj rokoj, kvazaŭ sentante kaj timante alproksimiĝon de la mateno.

En la ĉielo kaj sur la tero estis sama silento kiel en la homa koro dum la minutoj de la matena preĝo; nur kelkfoje aflugis el oriento malvarmeta vento levetante, kovritajn per prujno, kolharojn de niaj ĉevaloj. Ni ekvojiris; kun granda peno kvin ĉevalaĉoj trenis niajn veturilojn laŭ zigzaganta vojo sur la Gud-monton; ni marŝis malantaŭe, metante ŝtonojn sub la radojn, kiam la elfortiĝintaj ĉevaloj haltis; ŝajnis, ke la vojo kvazaŭ kondukas en la ĉielon, ĉar, kiom nur la okulo povis vidi, ĝi ĉiam supreniris kaj fine, perdiĝis en la nubo, kiu jam dum la vespero ripozis, kiel vulturo atendanta sian viktimon sur la supraĵo de la


Gud-monto; la neĝo krakis sub niaj piedoj; la aero fariĝis tiel maldensa, ke la spirado dolore malfaciliĝis; la sango ĉiuminute fluis al la kapo, sed malgraŭ ĉio ĉi ia ĝoja sento plenigis ĉiujn miajn fibrojn kaj mi fariĝis gaja, ĉar mi estis tiel alte super la mondo — sendispute ĝi estis infaneca sento, sed forlasante post si la mondumajn konvenciojn kaj proksimiĝante al la naturo, ni nevole fariĝas kiel infanoj: ĉio allernita forfalas de la animo, kaj ĝi fariĝas denove tia, kia ĝi estis iam antaŭe kaj, certe, kia ĝi estos iam poste. Tiu, kiu havis okazon, kiel mi, vagadi laŭ dezertaj montoj kaj longelonge rigardadi iliajn kapricajn formojn avide englutante la vivigan aeron, disfluitan en iliaj fendegoj, tiu, certe, komprenos mian deziron trandoni, rakonti, priskribi tiujn ĉi sorĉajn bildojn.

Jen, fine, ni surgrimpis la Gud-monton, haltis kaj posten rigardis: sur ĝi pendis griza nubo, kaj ĝia malvarma elspiro minacis aŭgurante, ke ni surmetos burkon; sed en la oriento ĉio estis tiel hela kaj oreca, ke ni, tio estas mi kaj la stab-kapitano, tute forgesis pri tio... Jes, la stab-kapitano ankaŭ: en la koroj de simpluloj la sento al beleco kaj majesteco de la naturo estas pli forta, centoble pli viva, ol en ni, entuziasmaj rakontistoj pervortaj kaj perpaperaj. "Vi, mi opinias, jam alkiutimiĝis al tiuj ĉi belegaj bildoj?" diris mi al li.

"Jes, eĉ al la fajfado de kuglo oni povas alkiutimiĝi, tio estas, alkiutimiĝi kaŝi frapadon de sia koro."

Kion vi trovos

en Japanujo




Ŝoohaĉi Nakagaŭa

LKK Tokio

Dum ĉiam pli proksimiĝas la tempo de la unua Universala Kongreso en Azio, la neĵapanaj partoprenontoj (ĵam pli ol 400) antaŭenrigardas ne sole al eksterordinaraj turismaj vidindaĵoj, sed precipe al ekkono de tute apartaj konceptoj kaj kulturo.

Dekstre: Perlokonko-bredejo en "Ago"-golfo, proksime de urbo Nagoja, en centra Japanujo.

Supre: Torijo kaj ŝtonlanterno de ŝintotemplo Icukuŝima, Enlanda-mara Nacia Parko.




La japanaj pejzaĝoj ne estas grandiozaj nek surprizaj; ili estas eĉ mildaj, sed malsimplaj, variaj je formoj kaj koloroj kun abundaj nuancoj.

Etendiĝante longe de nordo al sudo la insularo japana havas samtempe karakterojn de norda kaj suda klimatoj. Frosta montregiono kun larikoarbaro en Hokkaido kaj subtropika zono borderita de ĉiamverdaj kverkoj en Kiuŝuu. Sunriĉa gaja marbordo de Pacifika Oceano kaj ombrita kvieta golfo de Japana Maro. Krome oni povas facile imagi kiel variaj estas la ŝanĝoj de la geografiaj trajtoj, se oni scias ke en tiuj malvastaj insuloj troviĝas ĉie altaj montoj de ĉirkaŭ, aŭ pli ol, du mil metroj; iuj el la montoj estas vulkanoj aktivaj aŭ ripozantaj. Riveroj estas nature rapid-fluantaj. Akvofaloj kaj lagetoj troviĝas tie kaj ĉi tie. Tra la lando troviĝas multnombraj varmfontoj diversspecaj, kiuj estas ŝatataj de vojaĝantoj. Enlanda maro ĉirkaŭita de la grandaj insuloj kaj punktita per sennombraj insuletoj formas unu el la reprezentantaj pejzaĝoj en la okcidenta parto de Japanujo.

Dank' al abunda pluvo ĝenerale, arbaroj plene kovras aŭ borderas montojn kaj kampojn, kaj al la varieco en la geografiaj trajtoj adaptiĝas nature la specoj kaj ekologiaj * tipoj de la kreskaĵoj. Krome ne nur la naturo propra sed ankaŭ konstruaĵoj faritaj de la popolo aldonas al la pejzaĝo impresajn punktojn. Inter aliaj speciale menciindaj estas mezepokaj kasteloj kaj antikvaj budhismaj temploj. Unikan imponan belecon arkitekturan montras japanaj kasteloj. Oni apenaŭ povus imagi ke ili estas konstruitaj el ligno. Temploj antikvaj ankaŭ estas lignokonstruaĵoj, kiuj eltenis jarcentojn kaj staradas en kvieta atmosfero.



Supre: La sinjorinoj portas kimonon kun haoro kaj zorioj. Tiu sidanta antaŭ ikebano (dekstre) manĝas per haŝio.



Parolante pri pejzaĝoj oni ne povas ne tuŝi japanajn ĝardenojn, kiuj prezentas al ni tute diferencon aspekton kompare al la eŭropaj. Japanaj tradiciaj ĝardenartistoj celadis rearanĝi aŭ rekrei pitoreskajn pejzaĝojn aranĝante rokojn kaj arbojn. Tio ne estas nura imitado de naturaj pejzaĝoj, sed, per la rimedo akcenti gravajn elementojn de la beleco de natura pejzaĝo kaj neglektante la aliajn punktojn, ĝi aperigas artefaritan naturpejzaĝon en simbola naturo. Krom rokoj kaj arboj artistoj aplikas sablon, herbojn, bambuon kaj metas laŭbojn, ŝtonlanternojn kaj pontojn en la ĝardeno. Geniaj laboraĵoj de antikvaj artistoj (ĉ. 1300-1600) apud la malnovaj temploj en Kioto k.a. estas ankoraŭ nun nepraj vizitlokoj por turistoj.

Aldone menciinda estas la efekto de sezonaj ŝanĝoj al la beleco de pejzaĝoj. Kaj plie, ŝanĝemaj estas la veteroj de la insullando, kie la kontinenta vento ŝatas tre ofte rendevui kun la aero de l'oceano, kaj tio aparte donadas nuancoriĉan efekton al portempaj esprimoj de japanaj pejzaĝoj.

*) Ekologio: scienco pri kunvivado de specioj.



Roger Bernard,
tradukinto de Sartre

Sen eliro kaj La respektama p..., dramoj de Jean-Paul SARTRE. El la franca trad. R. BERNARD. Eld. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1964. 111 p., 20 × 13 cm. Prezo: 6,— gld. (24 st).*

Kiel sciante, Sartre estas teza aŭtoro. Per siaj verkoj li celas ekzempli sian filozofion. Apud *La naŭzo*, la du supraj titoloj estas inter la plej karakterizaj en tiu direkto. Laŭ Sartre, ni estas kondamnitaj elekti nian vivon. Kaj plej ofte ni elektas pozadi. Ne pro ia vanteco, sed ĉar ni kredas, ke la bildo, kiun la aliaj faris pri ni, estas pli solida kaj reala, ol la fakta personeco. Tial Estelle, en la impresa sceno de la speguloj, asertas en *Sen eliro* (p. 32): "Estas ses grandaj speguloj en mia dormoĉambro... Kiam mi parolis, mi zorgis, ke mi povu rigardi min en unu el ili... *Mi vidis min tia, kia la homoj vidis min, kaj tio tenis min vigla.*" — Estelle, Inès kaj Garcin, la nuraj rolantoj, estas kondamnitaj je ŝajniga ekzistado, ĝuste tiu ekzistado, kiu malfeliĉe kontentigas la plimulton de la homoj. La malkuraĝulon Garcin turmentas en la infero, ke li mortis malkuraĝe. Kaj la tezo pri la libereco aperas fine, kiam Garcin demandas: "Estelle, ĉu mi estas malkuraĝulo?", kaj ŝi respondas: "Sed mi tute ne scias, amo mia, *mi ne estas en via haŭto; devas decidi vi*" (p. 53). — La verko do nudigas kaj skurgas la pozojn kaj la komediojn, kiujn ni ludas antaŭ aliaj por eviti mem elpaŝi, kiaj ni fakte estas.

*) ricevebla
ĉe U.E.A.

En la alia peco, *La respektama putino*, temas

pri satiro kontraŭ la konformistoj. Nia moralo estas nur kolektiva, ara formulo, kiu nin ekskuzas havi internan respondecon, propran vivon, kian ajn sincerecon. Tiucele Sartre lokigas la agadon en Usono. Post kiam bon-societa juna blankulo mortigis negron, oni volas trudi al putino, ke ŝi false atestu, ke la negro volis perforti ŝin. Sed la putino estas nature sincera, kaj ŝi volas atesti nur la veron. La malfeliĉa knabino, malgraŭvole, *devas* akcepti, ke la justo kaj la vero nur povas esti ĉe la flanko de la respektinduloj, reprezentitaj de senatano (p. 96): "Ĉu vi kredas, ke la tuta urbo povas erari? Tuta urbo kun siaj pastoroj kaj sacerdotoj, kun siaj kuracistoj, siaj advokatoj kaj siaj artistoj, kun sia urbestro kaj liaj adjunktoj kaj kun siaj bonfaraj asocioj. Ĉu vi povas tion kredi?" Kaj la putino fariĝas respektama, ne de la justeco, sed de la loka moralo. Sartre montras, ke la individua homo, nekapabla krei en ĉiu momento siajn proprajn valorojn kaj vivi sincere kaj aŭtentike, elektas sin ŝildi per falsaj valoroj jam ekzistantaj kaj sin azili en ilin.

Post la resuma prezento de ambaŭ pecoj, restas al mi diri, ke mi ĉeestis prezentadon de la unua en Hago (1964) kaj aŭdis la duan el sonbendo. Poste mi legis ambaŭ. Same pri la aŭda kiel pri la lega lingvaĵo mi povas diri, ke ĝi fluas absolute glate, kaj Bernard estas aparte gratulinda, ke li sciis redoni ambaŭ teatraĵojn en perfekte scenotaŭga Esperanto.

J. Régulo (La Laguna)

kongres- raportoj

LA ANTAŬKONGRESO EN BRUSELO

Pli ol 210 geesperantistoj el 23 landoj partoprenis la Oficialan Antaŭkongreson en Bruselo.

La programo estis ĉefe distra kaj konsistis el du akceptoj, du ekskursoj, du vizitoj al muzeoj kaj unu bankedo kun balo. La kongresanojn regalis la firmo Martini en la luksaj salonegoj de moderna nubskrapulo. La Urbestro de Anderlecht (Komunumo de Bruselo), parlamentano Bracops, bonvenigis en Esperanto la partoprenantojn okaze de granda akcepto en la parko de la Erasmo-domo.

Parto de la kongresanoj vizitis la mezepokan Abatejon de la Cambre, dum alia parto admiris la multenombrajn pentraĵojn de la flandra skolo en la Belarta Muzeo aŭ la praepokajn fosiliojn de la Naturscienca Muzeo. Ĉiuj vizitoj okazis kun klarigoj en la Internacia Lingvo zorge de fakuloj.

Dum la bankedo, la prezidanto de la organiza komitato, s-ro G. C. Fighiera, adiaŭis la kongresanaron, kiu la postan tagon forveturis al Hago, la Kongresurbo, per speciale rezervitaj vagonoj. Dum la tuta Antaŭkongreso, la belgaj fervojoj deforigis en la stacidoma informejo fervojistojn parolantajn Esperanton.

LA POSTKONGRESO EN LEEUWARDEN

Ne povas esti alia konkludo: ĝi bonege sukcesis! La Postkongreso metis sian stampon sur la ĉefurbon de Frislando. Ĝi altiris sufiĉan atenton de la publiko. Ĉiuj lokaj ĵurnaloj raportis, kaj la radio por norda Nederlando elsendis intervjuon kun atentigo pri la eldono de "Frisaj Rakontoj en Esperanto". Feliĉe la libro aperis tuj antaŭ la Kongreso.

Proksimume 200 personoj el 23 landoj partoprenis la Postkongreson, aŭ kelkajn erojn. Estis bonhumora grupo, kiu vizitis 6 el la 11 urboj de tiu provinco, kaj kiu ĝuis kaj admiris la pejzaĝojn. La kongresanoj ne konatiĝis kun Frislando nur dum tiuj ekskursoj. Ili aŭdis frisajn kantojn kaj poemojn, vidis popol-dancojn (kaj mem partoprenis) kaj aplaŭdis la ĉarman prezenton de infana cirko el Leeuwarden. Kelkaj filmoj kaj mallonga prelego rakontis al ili pli pri Frislando, precipe ankaŭ pri Frislando dumvintra, kiam neĝo kaj glacio donas tute alian vizaĝon al la regiono.

Elstaris la afabla akcepto de la urbestro, ĉe kiu la urbestro parolis esperante. Rezulte de tiuj kontaktoj verŝajne okazos oficialaj vizitoj el Leeuwarden al Skövde, Svedujo.

(Laŭ raporto de Frisa E-ista Rondo)

Elektitaj poemoj de To HUU. Elvjetnamigis Đào anh KHA. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1964. 228 p. 19 × 13 cm., il. Prezo: 3,90 gld.*

Estas fakto, ke la beletro ĝuas malpli da respekto nuntempe, almenaŭ en la Okcidenta Kultursfero, ol estis dumlonge. Kaj laŭ aŭtoroj kaj legantoj ĝi okupas malpli gravan rolon ol antaŭe. Tial freŝigas renkonti poeton, kiu ne dubas pri la rolo de la poezio: ĝi estu batalilo por la justeco.

Tiu ĉi libro enhavas poemojn elektitajn el tri poemlibroj de To Huu, kronologie aranĝitajn, krom kelkaj pli freŝdataj. Ilin antaŭas tre bona prologo de Prof. Dang thai Mai, kie li emfazas kiel ĉeftraĵon de la poeto la unuecon inter lia vivo kaj lia arto. To Huu estas revolucia poeto, kiu mem partoprenis en la lukto. Tiu fakto estas la kerno mem de ĉiu lia poemo. Ofte ĝi esprimiĝas krude, kiel atendeble, sed ĝi ankaŭ povas havi mildan tonon, eĉ naiv-romantike esprimivan, kiel

*De tiam en mi brilis radioj de l'somer'
Lumigas koron mian jam suno de la ver'
Disfloranta ĝarden' fariĝis mia anim'
Kun birdkantoj senfinaj kaj incensa senlim'...*

Tiel esprimas la poeto sian vekiĝon al la Revolucio.

La tradukoj de Đào anh Kha estas liber-ritmaj, gramatike ne senmakulaj, tamen ĝenerale tolereblaj.

Baldur Ragnarsson (Reykjavík)

Meteoro, teatraĵo en 3 aktoj de Peter KARVAŠ. El la slovaka trad. Vladimír GAZDA. Eld. Diliza, Bratislava, 1963. 60 p. 20 × 14 cm. Multobligita kun presita kovrilo. Prezo: 0,75 gld. (3 st).*

Tradukoj el la slovaka lingvo preskaŭ ne ekzistas en Esperanto. Ĝis nun mi nur unufoje renkontis ilin — en la Ĉeĥoslovaka Antologio. Tial la "Meteoro" estas salutinda, eĉ se en la pli ol modesta vesto.

La temo elektita de la verkisto estas nobla, porpaca, kaj lia torĉ-ideo, lumigante krevpecojn el la ĵuspasintaj militaj teruraĵoj, ofte nudigas senliman moralan mizeron de nia generacio. Bedaŭrinde nur, ke la verkista plumo multloke estas tro malakra kaj transglitanta en predikeman ĉefartikolismon de gazetoj.

Inter la protagonistoj plej sukcese estas ellaborita la karaktero de Christoph, dume la sovaĝa vivimpeto de Johann, rompvenkita en iel senbrula krizo, restas nekonvinke pala. La figuro de la profesoro, la morala spegululo de la etiko, bedaŭrinde estas prezentita nur en skizaj strekoj. Kaj la sola virina kunaganto, Eva, ŝajnas tro "maceca".

Tamen la teatraĵo estas leginda, ĉar ĝin multloke ornamas la noblaj tendencoj tiel parencaj al nia movado. Eĉ pli, en la atmosfero de la esperantistaj kunvenoj ĝia prezentado povus sonorigi potencon reeĥon.

Ivo Rotkvič (Zagreb)

Quaestionarium medicum, de F. MEYBOOM. Eld. Elsevier, Amsterdam-Novjorko, 1961. 213 p. 19 × 13 cm. Kuracista frazaro en lingvoj angla, franca, itala, hispana, portugala, germana, nederlanda, norvega, sveda, finna, rusa, pola, greka, ĉina, japana, malaja kaj Esperanto. Prezo: 16,— gld. (64 st).*

La celo de "Quaestionarium medicum" estas ebligi al kuracistoj, flegistinoj k.s. fari demandojn al pacientoj, kun kiuj ili ne havas komunan lingvon. Tiucele ĉiu demando aŭ instrukcio havas numeron, per kiu ĝi estas trovebla en aliaj lingvoj. La elekto de la lingvoj verŝajne spegulas ĉefe la bezonojn de nederlandaj kuracistoj, sed ankaŭ en aliaj landoj la verko estus ofte uzebla. Iom grava manko inter la 475 frazoj estas tiu de demandoj pri gravedeco (ja sufiĉe universala malsano!).

Generale, la tekstoj estas akcepteblaj. Tamen, kvankam "tradukitaj de spertuloj", la sekcioj angla kaj itala (kaj verŝajne aliaj) enhavas diversajn strangaĵojn. Ankaŭ preseroj ne mankas, kaj almenaŭ unu demando tute elfalis el la norvega teksto.

En la esperanta sekcio troviĝas kelkaj nederlandismoj. En alia verko oni eble facile pardonus la erarojn kaj mispresojn, sed kiam temas pri gravaj medicinaj decidoj oni nevolonte imagas la rezultojn de eĉ plej simplaj miskomprenoj.

V. Sadler

Lernolibro de Muzilo, de H. PARUZEL. Eld. Muzilo, Dordrecht, 1964. 36 p. 29 × 21 cm. Prezo: 5,— gld. (20 st).*

Muzilo-kajero n-ro 1, de H. PARUZEL. Eld. Muzilo, Dordrecht, 1964. 24 p. 29 × 21 cm. Prezo: 3,50 gld. (14 st).* 18 pecoj.

La tradicia muzikskribado montriĝis nepraktika, malperfekta kaj malfacila. La esperantistoj jam konas almenaŭ tri provojn de reformo, pri kiuj aperis pli malpli detalaj prospektoj: la "Aŭtonoma muziknotado" de Jean Hautstont (1907), la "Izomorfa sistemo" de Maciej Zalewski kaj la t.n. "Nederlanda sistemo", kies ido estas la "Muzilo" de prof. Paruzel. Ĉiuj ĉi sistemoj havas komunan principon: ili baziĝas sur la egale temperita 12-grada skalo. Tamen, ili ĉiuj neglektas la diferencon inter la enharmoniaj tonoj, gamoj kaj intervaloj, kiuj, kvankam ludataj per la samaj klavoj, havas malsaman akustikan valoron kaj malsamajn tonalajn funkciojn. "Muzilo" estas tre bone adaptita al la dodekafona muziko, sed ĉu ĝi donas eblecojn por notado de la netemperitaj intervaloj, kiuj abundas en la folkloro?

Muzilo-Kajero 1 prezentas malgrandan antologion kun popularaj fragmentoj de voĉa kaj instrumenta muziko. La muzikaj tekstoj estas facile deĉifreblaj por ĉiu profesia muzikisto, eĉ amato.

St. Djoudjeff (Sofio)



Recenzis
Stojan Djoudjeff



"Nederlando"

Post la tre sukcesa eldono de unuaranga fotolibro poŝformata:

"Infanoj ne konas limojn", la sama entrepreno BRUNA, unu el la plej grandaj en Nederlando, pretigis okaze de la 49-a UK en Hago novan volumon, ĉi-foje kun plejparte koloraj fotoj. Ĝia temo estas "NEDERLANDO", kaj la fotilo de Kees Scherer elserĉis kaj registris ne nur la simbolo konatajn aspektojn de tiu teritorio, kiel la apuda ventmuelilo, sed ankaŭ la kastelojn, la artaĵojn,

kaj libertempaĵojn de la nederlandanoj. La koloroj varias inter la paŝtelaj nebuloj de aŭtuno kaj la solidaj farboj de florkampoj kaj kanotaj veloj. Aldonitaj estas 36 paĝoj da teksto (de Jaap Romijn) pri la historio de la lando, pri la karaktero kaj monumentoj de ĝiaj urboj, pri la apartaĵoj de ĝiaj loĝantoj ("En Nederlando oni manĝas supon de la pinto de la kulero kaj ne, kiel en Britujo, de la flanko") kaj fine pri ĝiaj turismaj eblecoj. Se entute io mankas, tio estas eble ia skiza mapo por helpo de la legado. La libro kostas 3,50 gld. (14 st). Mendebla ĉe UEA.

VS

Kontakto, kvaronjara revuo de TEJO. Redaktoro Humphrey Tonkin. N-roj 1 (provnumero, somero '63), 2 (printempo '64) kaj 3 (somero '64). Jarabono: 8,— gld (32 st).*

La regulaj numeroj ricevis rimarkinde pli junecajn aspektojn ol la lastjara provnumero. La plimodernigita kovrildesegno, nova aranĝmaniero de l' artikoloj kaj ilustraĵoj, kaj, antaŭ ĉio, la relative pliriĉigita enhavo certe plaĉas al la juna leganto. Primovadaĵ informoj cedis sian tutan lokon al sociaj, kulturaj, sciencaj k.a. temoj, laŭ la aprobinda principo de la redakcio, ke oni faros el la revuo "ne... nur ankoraŭ alian novaĵfoliaron aŭ anoncaron, sed veran gazeton..."

La temoj ĝenerale estas variaj kaj interesaj inkl. la socian problemon de usonaj kaj francaj gejunuloj, la edukadon en la Nova Nigerio, la fenomenon de "perfingra vidad", kaj aspektojn de la latinalfabeta manskribo. Cetere ĉiu numero entenas ŝatatan noveleton.

Tamen, ĉu ni devus jam per ili centprocente kontentiĝi? La redaktoro plendis en n-ro 1, ke mankas i.a. materialoj pri la Oriento kaj pri sporto. Kial, do, la breĉoj restas ne ŝtopitaj ankoraŭ post jaro? Des pli mirige, ĉar la kuranta jaro estas tiu de l' Olimpiaj Ludoj — unuafojaj en la tuta Azio... Plie, ĉu ni devus konkludi ke neniue leganto havas menciindan opinion pri "needzinaj patrinoj", ĉar ĉi tiun artikolon de juna usonanino en n-ro 1 sekvis nenia eĥo? Gravus, ke la revuo estu ne nur plaĉa "artikolaro", sed ankaŭ forumo de varma komuna diskuto, por meriti sian nomon.

Kenji Naemura (Tokio)

Internacia Elparolo. Eld. UEA, Rotterdam, 1964. Disko 18 cm diam., 33 1/3 r.m., daŭro 15 minutoj. Legaĵoj. Prezo: 1,50 gld.* (6 st.).

Laŭenkonduke, oni celas prezenti ĉi tie specimenojn de la Esperanta elparolo de diversnaciuloj uzantaj Esperanton efektive ĉiutage. Partoprenas 5 el la oficistoj de UEA — anglo, aŭstraliano, nederlandano, italo kaj germano. La aŭstralianon oni prefere nomu laŭdevene jugoslavo; rilate al elparolo pli gravas la gepatra lingvo, en tiu ĉi kazo la kroata, ol la ŝtataneco.

Mi diru tuj ke la prononco de ĉiu estas bona, konformante la iom elastajn postulojn de la elparolo internacia. Estas malmulta indiko pri nacieco, iom pli tamen ĉe la germano. Aparte interesas la intonacioj, kie la internacia lingvosento ankoraŭ nebulas. La materialo estas interesa kaj ĉiam klare eldirita.

Tamen evidentas, ke tiuj ĉi ne estas deklamistoj. Foja mislokigo de la frazakcento, foja monotoneco, foja troklareco — ĉio tio montras ke ili pli lertas konversacii Esperante ol deklami. Konsilindus inkluzivi pli da konversacieca materialo, kiu montru la proprajn kapablojn de la parolantoj.

Eleanor Higginbottom (Londono)

Sun Vukong trifoje batis la spiriton de Blanka Skeleto, bildrakonto laŭ romano de VU Ĉeng-en, trad. ZEKUN. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 110 p., 25 × 17 cm. Prezo: 1,60 gld (6,4 st).*

Bildrakonto bazita sur 16a-jarcenta romano de Vu Ĉeng-en. Temo: batalo inter la heroo Sun Vukong, la protektanto-akompananto de siaj majstro Tang Seng kaj fratuloj, kaj la Spirito de Blanka Skeleto, kiu deziris frandi la karnon de Tang Seng k.a. Trifoje la Spirito venis aliforme al Tang Seng por ruze forlogi lin, sed ĉiufoje Sun Vukong malkovris ĝin. Sed fine la Spirito sukcesis igi Tang Seng forpeli sian fidelan disĉiplon. Kaj kaptinte Tang Seng, estis lin manĝonta kun sia patrino. Tiam la patrino ŝanĝiĝis en Sun Vukong-on kaj prenante multkorpan formon ekstermis la Spiriton kaj ĝiajn monstrojn. Sun Vukong estas simio — singarda, sagaca, fidela, kaj ruza. La Spirito estas virino — ruza, avida, kaj malhonesta. Ĉiu linio de la desegnaĵoj vivas. Eĉ la strangaj arboj kaj folioj reflektas la situacion. La tuta libro estas fenestreto montranta la ĉinajn kulturon kaj animon. Lingvo kaj stilo — perfektaj.

Aŝvini-kumar' (Amsterdam)

La akupunkturo kaj kaŭterizo de Ĉinio. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 16 p., 18 × 13 cm, plus 4 fotopaĝoj. Prezo: 0,40 gld.*

La tradicia ĉina medicino estas, kvankam esence tute diferenca ol la eŭropa, evoluinta tra jarmiloj kaj pruviĝis efika en kuracado. Ĝi indas esti, kaj estas fakte detale pristudata en Ĉinujo, Koreujo kaj Japanujo. La akupunkturo kaj kaŭterizo staras sur teoria bazo, ke ekzistas specialaj vojoj inter enhaŭtaj difinitaj punktoj kaj internaj organoj, kaj la ekzisto estas nun science studata ankaŭ en Eŭropo.

Masao Suzuki (Japanujo)

Ni kantu en Esperanto. Eld. Esperanto Disk, Inc., Nov-Jorko, 1964. Disko 30 cm diam., 33¹/₃ r/m, daŭro 40 min. Prezo: 13,50 gld (54 st).^{*} Kun aldonitaj kanto-tekstoj.

Anoncita kiel la unua provo en serio da usonaj esperantaj diskoj, "Ni kantu en Esperanto" impresas, malgraŭ siaj meritoj, iom prove-amatore. Ĝiaj meritoj komenciĝas ĉe la sprita kovril-ideo, kiu ĝuste sugestas la duone ŝercan spiriton de la enhavo. Je la aĉetiga flanko oni devas kalkuli ankaŭ la teknikan bonecon de la registraĵo. Negative pezas la stranga mikso: de serioza poemo ("Babij Jar" de Jevtuŝenko, forta deklamaĵo de Julius Balbin) kun humura monologo de Duncan Charters kaj parte bona kantado kun gitaro de Frans Jahger, kiu lasta okupis la pli grandan parton de la disko. Entute: kuraĝa komenco de nova, bezonata entrepreno.

V. Sadler

La ora hakilo. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 12 p., 25 × 21 cm. Kolorpresita infanlibreto. Prezo: 0,80 gld.^{*}

La vulpo. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 16 p., 19 × 14 cm. Kolorpresita infanlibreto. Prezo: 0,40 gld. (1,6 st).^{*}

Pri la venko de bono kontraŭ malbono, "La ora hakilo" estas fabelo pri bonkondata knabo; "La vulpo" temas pri bestoj. Ambaŭ libretoj estas ĉarme ilustritaj — precipe "La ora hakilo" — per allogaj, bone presitaj bildoj. La tradukoj enhavas kelkajn iom longajn vortojn, kiuj necesigos zorgan legadon.

R. H. Fletcher (Britujo)

Du linioj pri la demando de milito kaj paco. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1964. 36 p., 18 × 13 cm. Prezo: 0,40 gld (1,6 st).^{*}

Resumo: Jen artikolo de 19.11.63, kiu celas diferencigi reviziismon kaj marksismon-leninisman per la demando, ĉu imperiismo estas aŭ ne estas grava danĝero al paco. Ĝi prezentas la vidpunkton de KPC interalie pri la uzado de nuklearmiloj.

Enkonduko en la leteroj de la sankta apostolo Paŭlo, de H. G. WANNEMAKERS S. J. Eld. Internacia Katolika Informejo, Tilburg, 1964. 31 p. 22 × 14 cm. Serio de I.K.I. n-ro 7. Prezo: 1,10 gld. (4,40 st).^{*}

Resumo: Tiu ĉi referenco-plena studo enhavas biografiajn informojn pri la apostolo, detalajn artikolojn pri la valoro, verŝajna tempordo kaj aŭtentikeco de liaj leteroj, kaj kelkajn mapojn.

La historia sperto de la proleta diktaturo. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1964. 59 p., 18 × 13 cm. Prezo: 0,80 gld. (3,2 st).^{*}

Resumo: Du artikoloj verkitaj post la 20a Kongreso de KPSU en 1956 laŭdas la tiean kritikon pri eraroj de Stalin sed rekomendas analizan sintenon al eraroj faritaj. La dua artikolo traktas la dufrontan lukton kontraŭ reviziismo kaj dogmismo rilate al la hungarlanda malpaco de 1956, kaj pledas por internacia solidareco.

Ne kiel Meier! de Raymond SCHWARTZ. Eld. UFE, Parizo, 1964. 17 × 11 cm. 47 p. Prezo: 1,50 gld (6 st).^{*}

Meier estis atisto, samtempulo de Zamenhof, kiu lasta skribis: "La regulo de Meier pri la participo estas efektive malbona". Schwartz celas per ĉi tiu broŝuro popularigi inter tiuj, kiuj povas esti ankoraŭ sub influo de Meier kaj liaj adeptoj, la zamenhofan uzon de la participoj. Prave li notas, ke "en multaj okazoj oni povas uzi same korekte -ata aŭ -ita" — kun nur eta nuanco da diferenco. Sed ĝuste tiu ebleco, distingi etajn nuancojn, malaperas, se mankas la komuna normo de la zamenhofaj kutimoj.

V. Sadler

La konstitucio de la regno Japanio. Trad. Masuzo INOUE, Riej HASEGAWA. Eld. KLEG, Osaka, 1964. 19 p. 18 × 13 cm. 0,75 gld. (3 st).^{*}

Ni parolu Esperanton, de R. H. M. MARKARIAN, eld. University Tutorial Press, Ltd., Londono, 1964. 41 p. 21 × 17 cm., il. Klasa lernolibro kun anglalingvaj notoj. 3,— gld.^{*}

La morto de Jankio, rakontoj pri Sud-Vjetnamio, de diversaj aŭtoroj. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1964. 127 p. 19 × 13 cm.^{*}

La internacia rolo de la pacmovado, de H. F. BING. Eld. Internacio de Militrezistantoj, 88 Park Ave., Enfield, Mddx., Anglujo, 7 p. 25 × 20 cm., multobligita.

Speciala Bulteno de Centro de Esploroj pri Afriko, Dubois 3, Wrocław, Pollando, 1964. 27 p. 29 × 20 cm., multobligita.

Materialoj pri Mondpaca Esperantista Movado. Eld. 1964. 32 p. 25 × 19 cm., multobl.

A.P.-Librolisto. Dua eld. 1964, N.V. De Arbeiderspers, Amsterdam. 40 p. 14 × 10 cm., il.

Zycie Dr'a Ludwika Zamenhofa (Vivo de Zamenhof) de E. PRIVAT. En la polan trad. Jan PIÓRO. Eld. T. Drobny, 5016 West Ford St., South Bend 19, Indiana, Usono. 75 p. 22 × 18 cm., multobligita, il.

Kongresa Libro de 18-a Kongreso de Jugoslavaj Esp-istoj, 1964. 36 p. 20 × 14 cm., il. Prezo: 0,30 dol., de P.f. 213, Zagreb.

Sub la signo de la verda stelo. Eld. Dansk E-Forlag, Åbyhøj, 1964. 69 p. 21 × 15 cm. Rakontoj el Esp-ista vivo. Prezo: 3,50 gld. (14 st).^{*}

LUIS DA COSTA PORTO CARREIRO NETO

nekrologoj

La 21-an de julio, 70-jara, forpasis en Rio de Janeiro eksakademiano Porto Carreiro Neto, iama ĉefdelegito de UEA por Brazilo kaj sekretario de B.E.L. Li estis vaste konata pro siaj modelaj tradukoj, precipe de spiritismaj verkoj, el kiuj jam sep estas eldonitaj. Li postlasis manuskriptojn de 530-paĝa romano kaj vortarego portugala-esperanta.

BLANKA DELLA SAVIA

Je 14.8.64 forpasis s-ino Blanka Della Savia, edzino de la UEA-delegito de Favaro Veneto, Italujo. Ŝi estis hungardevena kaj edziniĝis per Esperanto en 1927.

esperanto
oktobro
1964

mallongaj novaĵoj

LAŬLANDE

Britujo

- La grava biblioteko de Brita E-Asocio, post longa atendado en konservejo, fine instaligos en la domo de BEA en Londono.

Ĉeĥoslovakio

- Sepdek-jariĝon festis en julio s-ro Teodoro Kilian, konata kiel organizanto, verkisto de lernolibroj kaj tradukinto de "La blanka mal-sano" de Ĉapek.

Danlando

- En Helsingør la tradiciaj Internaciaj FERIAJ Kursoj fine de julio allogis centon da partoprenantoj el 10 landoj. Okazis kursoj elementa, konversacia kaj progresiga, krom filmprezentoj, balo, prelegoj kaj ekskursoj. Raportis dana televido.

Finnlando

- Jam la duan jaron okazis kursoj kaj ekzamenoj de Esperanto en la urbo Lappeenranta, en la Somera Universitato de la mastrumada fako de Universitato Helsinki. Por ricevi diplomon "kun laŭdo", du E-kursoj estas devigaj.

Grekujo

- En Thessaloniki okazis antaŭ 500 ĉeestantoj prelego pri Esperanto de s-ro J. Koticas, subdirektoro de la Akademio de Instruistoj.

Koreujo

- En Seoulo 80 gestudentoj lernas kurse jam de majo; multaj ekkorespondas. Kiam la plej granda ĵurnalo "Dong-A" intervjuis prof. Eunsang Lee kaj s-ro Taekeng Kim (prez. kaj sek. de Korea E-Societo) kaj raportis tutpaĝe, multaj legantoj petis kursojn, sed instruistoj ege mankas. En aŭgusto 60 personoj ĉeestis la 6-an E-kongreson en Universitato Chunggu, Taegu. K.E.S. bonvenigos vizitantojn okaze de la 50-a UK en Tokio.

Madagaskaro

- Ekde 1965 la Ministerio por Informado kaj Turismo funkciigos internacian radio-stacion en diversaj lingvoj. Por ke ankaŭ Esperanto estu tie uzata, skribu aerpoŝte (ne poŝtkarte) al la Direktoro, Madagaskara Radio, B.P. 442, Anosy, Tananarive.

Sovetunio

- Kiam antaŭnelonge aperis en Moskvo nova brajla lernolibro "Fundamento de E. por blinduloj" de I. V. Sergeev, la tuta eldonkvanto estis tuj distribuita, precipe en bibliotekojn por blinduloj. Dua eldono estas postulata.
- Ducent personoj el tuta Sovetunio partoprenis E-tendaron komence de aŭgusto en Vejsejaj (Litovujo), urbeto, kie en 1885 komencis d-ro Zamenhof sian kuracistan karieron. Okaze de la renkontiĝo du stratoj ricevis nomon de d-ro Zamenhof aŭ de Esperanto. (Oni petas sendi gratulojn al prez. Petrauskas, D-ro Zamenhof gatve 10).

Usono

- En konferenco "La problemo de lingvo-diverseco en Afriko", organizita de la kongreso de ELNA en Nov-Jorko komence de julio, 200 personoj aŭdis enkondukan prelegon de prof. Mario Pei kaj longan diskuton. D-ro Pei intervjuis sudafrika ĵurnalo "Post" kaj radio "Voĉo de Ameriko" (dissendas 37-lingve), kaj skribajn salutojn sendis i.a. Luther Evans, antaŭe direktoro de Unesko, Muhammad Zafrulla Khan, antaŭe Prezidanto de UN, kaj senatanino E. Collins el Liberio.
- Nov-Jorka radio-stacio WEVD, kiu jam dissendas en 12 lingvoj, je 9 septembro komencis 15-semajnan E-kurson.

LAŬFAKE

Literaturo

- La biografio "Vivo de Zamenhof" de Privat (1920) ĵus atingis sian 6-an nacilingvan tradukon per eldono en la pola. Antaŭe ĝi aperis en la angla (3 eldonoj), ĉina (1935), japana, nederlanda (1947) kaj norvega (1959).

Medicino

- Post longa halto reaperis en Tiba, Japanujo, la organo de UMEA, sub la nova titolo: "Medicina Internacia Revuo".

Vegetarismo

- Komenciĝis, per 28-paĝa kajero multobligita, nova serio de "Vegetarano", fondita en 1914. Eldonas: J. Dorn, Vegetara Kolonio Amirim, Merom Ha'Galil, Israelo.

nekrologo

ANAKREON STAMATIADIS (1868-1964)

La 24-an de aŭgusto mortis d-ro Anakreon Stamatiadis. Li estis dumlonge membro de la Akademio de Esperanto, antaŭe de la Lingva Komitato, kaj Honora Membro de UEA. Ĝis la morto li estis la plej maljuna el la vivantaj veteranoj. Li eklernis Esperanton je la ŝanĝo de la jarcento, ĉeestis la Unuan Kongreson en Boulogne-sur-Mer, kaj konis la aŭtoron de Esperanto.

Lia unua agado por la lingvo estis en la insulo Samos, tiutempe sendependa princlando sub kontrolo de la Otomana Imperio, kie li atingis devigan enkondukon de Esperanto en lernejojn, fondis grupon kaj dum pluraj jaroj eldonis gazeton "Greklingva Esperantisto". Poste, en tiama Konstantinoplo, li eldonis novan revuon "Bizantio", kaj fondis ligan sub la sama nomo. En tiu multelingva grandurbo la bezono de interlingvo estis tre sentata, kaj "Bizantio" konservis altan nivelon.

Transirinte al Ateno fine de la 20-aj jaroj, d-ro Stamatiadis fondis klubojn kaj novajn gazetojn, starigis la Helenan E-Asocion kaj daŭre instruis senripoze. Entute li verkis almenaŭ 15 librojn pri kaj en Esperanto.

Hungarujo

- En nova lerneja eksperimento pri la lernado de Esperanto, d-ro István Szerdahelyi montris la grandan facilecon de la Internacia Lingvo por hungaraj lernantoj, kompare kun la angla, rusa kaj germana lingvoj.

BELARTAJ KONKURSOJ 1965

1. Principe, ĉiu rajtas konkursi, kiu aliĝis al la 50-a Universala Kongreso aŭ kiu estas individua membro de UEA.

2. La konkursa kotizo (sendepende, ĉu oni sendas nur unu aŭ plurajn verkojn por unu aŭ pluraj branĉoj): 3 respondkuponoj maldekstre stampitaj de la poŝto (bonvolu kontroli tion) aŭ malpli, laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie la sendo de respondkuponoj estas neebla, la partopreno estas senpaga.

3. Oni rajtas konkursi per maksimume tri (antaŭe en presformo ne aperintaj) verkoj en ĉiu branĉo. Ĉe branĉo 2. (tradukita poezio) oni zorgu eventuale pri la represa rajto. La premiitaj verkoj aperos laŭeble en la revuo "Esperanto" aŭ la revuo "Monda Kulturo", kaj sen la permeso de la redaktoroj de tiuj organoj oni ne rajtas antaŭe aperigi ilin en alia gazeto.

4. Literaturaj konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Oni sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu konkursaĵo kaj en la kazo de tradukoj ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo la nomon de la branĉo, por kiu ĝi estas destinita. Oni ankaŭ skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon, kiu efike kaŝas la nomon de la aŭtoro. Oni skribu sian nomon kaj adreson sur aparta slipo kun la pseŭdonimo kaj kun aŭ sia kongresnumero aŭ membromarko de UEA.

5. Oni sendu ĉion: konkursaĵojn, slipon, eventuale respondkuponojn, k.t.p. al la Peranto de la Belarta Konkurso: **s-ino E. Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio.**

La limdato por la ricevo de la konkursaĵoj estas la 31a de marto, 1965.

LITERATURA SEKCIO:

1. **Originala poezio** (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).

2. **Tradukita poezio** (maks. 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).

3. **Originala prozo** (novelo, eseo, artikolo, aŭ simile; ĉiu prozaĵo po 2000 — 3000 vortoj).

4. **Originala drameto** (ĉu por sceneja prezento, ĉu en formo de radio-dialogo; maksimuma ludodaŭro 25 minutoj).

Internacia komisiono juĝos la verkojn. La proklamo de la rezultoj okazos en tiucela kunsido dum la 50-a Universala Kongreso en Tokio. En la sama kunsido oni laŭtlegos el la premiitaj verkoj. Ĉiu premiito ricevos diplomon kaj monpremion. Por ĉiu branĉo estos po tri premioj; tamen la komisiono rajtas reteni premion aŭ premiojn, se ĝiaopinie la cirkonstancoj tion postulas.

La valoroj de la premioj estas difinitaj jene: por 1-a premio, 100 gld.; por 2-a premio, 70 gld.; por 3-a premio, 40 gld.; por la premio "Nova Talento", 70 gld.

Oni aparte petas, ke konkursantoj, kiuj tradukas verkojn de nemulte konataj aŭtoroj, aldonu al la konkursa traduko koncizajn biografiajn-kritikajn notojn pri la aŭtoro. Tiujn notojn oni poste utiligos okaze de eventuala publikigo de la traduko.

50-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Tokio - 31.VII - 7.VIII.1965

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata, Prezidanto de la Japana Akademio.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2

Rotterdam 10-9-1964

Kotizoj

La aliĝkotizoj presitaj sur la aliĝiloj disdonitaj dum la 49-a U.K. en Den Haag (blua koloro) estas eraraj kaj sekve nevalidaj. Validas nun la kotizoj presitaj sur flavaj aliĝiloj kaj ili estas la jenaj (ĝis 31-12-64):

	n.gld.	en.
Kongresano	50.—	5000
Edz(in)o de kongresano	25.—	2500
Junulo malpli ol 20-jara	19.—	1900
Universitata Studento		
de 20- ĝis 30-jara	31.—	3100
Blindulo	25.—	2500

Unua Bulteno

La 8-paĝa Unua Bulteno kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la Landaj Asocioj, Ĉefdelegitoj de UEA kaj kongresaj Perantoj kaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Glumarko

Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de UEA bela dukolora glumarko eldonita okaze de la 50-a Universala Kongreso. Prezo: 0,40 n.gld. (1,60 st.) por folio.

Statistiko (ĝis 10-9-64)

Arg. 4, Aŭstralio 19, Aŭstrujo 7, Bahamaj Ins. 2, Belg. 7, Braz. 9, Brit. 40, Bulg. 12, Centra Afrika Resp. 1, Ĉeĥos. 1, Danl. 14, Finn. 4, Franc. 65, Germ. 36, Hindujo 1, Hisp. 6, Hongkongo 2, Hung. 7, Irl. 1, Isr. 2, Ital. 17, Jap. 15, Jug. 10, Kan. 2, Maroko 2, Meks. 1, Monako 2, Ned. 29, Norv. 6, Nov-Zel. 4, Poll. 12, Rumanujo 1, Sved. 34, Svis. 9, Unuiĝ. Araba Resp. 1, Urugv. 3, Usono 26, Venez. 3. Entute 417 el 38 landoj. (Pasintjare 547 el 27 landoj).

ATENDAS VIN LA 21-a IJK EN OOTU KAJ KIOTO,


de 8 ĝis 15 aŭg. 1965 (tuj post la 50-a UK en Tokio). La urbo Ootu lokiĝas 10 km. oriente de Kioto, kaj estas fama feri-loko, kun 110.000 enloĝantoj. Apud Ootu troviĝas la belega lago Biwa, la plej granda en la lando. Provizora programo:

- 8-8: vojaĝo de Tokio al Kioto (aparte pagenda). Akcepto, balo.
- 9-8: solena malfermo, vizito al la urbo Ootu, akcepto de la urbestro.
- 10-8: diskutado, banado en la belega lago Biwa, belarta vespero.
- 11-8: prelego, ŝipveturado sur la lago.
- 12-8: sporta kaj oratora konkursoj.
- 13-8: tuttaga ekskurso al Kioto.
- 14-8: prelego, diskutoj, mitingo kun la loka junularo.
- 15-8: solena fermo.

Venu amase! Sendu viajn korespondaĵojn ĉiam *aerpoŝte* al: TEJO-kongreso, ĉe KLEG, 3-10 Nakatu Hamadoori, Oyodo-ku, OSAKA, Japanujo. Telegrafadreso: ESPCENTRO, Osaka.



esperanto
oktobro
1964 175



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al

H. Bakker, Kastelenstraat 231,

Amsterdam Z, Nederlando

forpasis:


LA 20-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN AMSTERDAM

Pluvo, nuboj kaj pluvo... tiel bonvenigis Nederlando la pli ol 200 gejunulojn, venintajn el 24 landoj por trafi unu la alian en la 20-a IJK. Feliĉe, ke ĉiu el ili estis antaŭe avertita: en la belega, zorge kompilita kongreslibro ne mankis poema plendo.

la komenco.

Pluvo falis kun mallongaj interrompoj kiam iom post iom sabatposttagmeze partoprenontoj alvenadis. En la pitoreska vilaĝeto Broek in Waterland, tuj ĉe la norda limo de Amsterdam, ili ĉiuj devis pasi sub la grandaj, verdaj slogantukoj, kiuj dum la tuta semajno sciigis al la publiko ke "Kongreso de Esperanto" danĝerigas la vilaĝon. Cetere la internacia afiŝo-kun-surpreso same avertis en ĉiu montrofenestro aŭ turisma profitejo.

*La unua
gravaĵo
— manĝi!*



Delegacio nome de la vilaĝo dum horo vane atendis la aŭtobusduopon el Den Haag, kaj riskis sian sanon starante ĉe la enirvojo de la vilaĝo. Fine la bonvenigo (esperante) okazis oficiale en la gastejo mem. Ankaŭ la loka ĵurnalo presis afablan artikolon honore al la IJK. Dum la interkonatiĝa vespero LKK interkonatiĝis precipe kun neatenditaj problemoj, kaŭzitaj de tiuj personoj (kelkdekoj da!) kiuj sen iu ajn antaŭa sinanonco aperis en la kongresejo. Jam tuj tiam pruviĝis la eksterordinare bona koro de la gastejestro kaj ties edzino, kiu plensarĝis sian domon ĝis la tegmento, anstataŭ fari la sole justan geston: al la pordo! Tiu koro meritis kaj akiris la admiron de ĉiuj dum la tuta semajno.

kravatoj.

Kravataj okazaĵoj — tiel jam baldaŭ la ĉiumatenaĵoj de LKK karakterizis la solenaĵojn kiuj postulis dignajn vestojn. Kaj ili vere abundis — ne la kravatoj sed la solena

inaŭguro, la honorvino en la Anne-Frank-Domo tuj poste, la luksa akcepto fare de la urbestro de Amsterdam, la pli neformala de la Broek-a vilaĝestro, la akcepto merkredvespere de junularaj organizoj, la vizito al la impone bela urbdomo de Hilversum, kie la vic-urbestro spertis la plej terurajn momentojn el sia kariero, parolante dum kvin minutoj en lingvo por li simila al la ĉina (sed honoron

al lia gesto kaj liaj konsilintoj). Mi nur elektas la inaŭguron, nejuste neglektante aliajn simpatiajn kaj belajn kravataĵojn.

Pluvis (kompreneble) kiam dimanĉe precize je la 14.00-a h. la prezidanto de LKK kun jam raŭkiĝinta voĉo ekbonvenigis la eminentajn gastojn. Ĉeestis i.a. la alta protektanto, prof. d-ro J. Kok, rektoro de la Universitato; kvar membroj de la honora komitato, reprezentante i.a. la Nederlandan Nacian Komisionon por Unesko, la Centran Nederlandan Junularinstancon, kaj UEA-n; reprezentanto de la urbo Amsterdam, k.a. La prezidanto de TEJO malfermis la kongreson per kelkaj vortoj. Skribajn mesaĝojn de saluto kaj bondeziro de tre multaj eminentuloj (i.a. de la kronprincino Beatrix) sekvis maltradicie multaj salutoj de reprezentantoj de internaciaj junularaj organizoj: WAY, FIOCES, ISMUN kaj Mondfederalista Junularo, el kiuj la lasta parolis en perfekta Esperanto. Fine la naciaj delegacioj en rapida stafeto trotis al la katedro kaj reen, por esprimi siajn afablajn, mallongajn mesaĝojn.

Post unu horo jam la kongresanaro povis ekpromeni al la vino, kiu atendis en la salono de la Anne-Frank-Domo. Dumpromene kariljono de la fama Okcidenta Turo superŝutis ilin per internacia melodiaro, kun "La Espero" kiel fino. Tiu koncerto estis denove prezentaĵo nome de la urbo Amsterdam, kiu tiel riĉe kaj bonvole helpadis al niaj klopodoj.

la anne-frank-domo.

La domo, kiu famiĝis pro la tragedio — unu el la sennombraj — kiu okazis en ĝia interno dum la milita okupacio, hodiaŭ servas kiel muzeo kaj internacia junularcentro. Jam ekzistis aktiva interesiĝo por Esperanto en la centro, kiam ĝi konsentis kun-inviti la 20-an IJK. La domo servis dum la tuta semajno kiel kongresejo, kie dufoje okazis programero. Post unu jaro denove okazos internacia junularkonferenco en la Anne-Frank-Domo. Se aliĝos sufiĉe da esperantistoj oni akceptos kiel kongreslingvon krom la angla ankaŭ Esperanton.

prelegoj.

Lunde la Anne-Frank-Domo gastigis la kongreson por aŭskulto de prelego de mag. G. H. Slotemaker-de Bruine, frakciestro en la parlamento de la Socialista Pacifista Partio. Mag. Slotemaker en Esperanto respondis al

la retora demando: "Milito – ĉu solvilo por internaciaj konfliktoj?" kaj tiel elvokis interesan diskuton. Lia respondo al la ĉiam aktuala demando "kion ni – la junularo – povas fari konkrete?" estis, ke la junularo uzu sian influon en ĉiuj organizoj en kiuj ĝi aktivas. Nelaste tio estas la Esperanto-organizo.

Kiel unua provo paroli pri preskaŭ-politikaj temoj la prelego certe sukcesis, kvankam ne ĉiam la intelekta interesiĝo de ĉiuj kongresanoj montriĝis impona.

La sama prefero por amuziĝo anstataŭ okupiĝo kun t.n. seriozaj aferoj kaŭzis, ke malpli ol duono ĉeestis la diskuton pri Afriko. La zorge kompilita dokumento de CEA vekis la malaprobon de Ibrahim Tambura, kiu kontribuis almenaŭ tiusence en la debato, ke oni certe pli singarde ekagos en Afriko, ol oni antaŭe intencis. La ĵusfondita Afrika komisiono certe profitos tiun ĉi kunpuŝon de ideoj.

regenta ĉambro. (La ĉambro "fermita").

Por la partoprenintoj ĉisupra indiko certe sufiĉas por indiki la estrarajn kaj komitatajn sesiojn. Jam antaŭ la kongreso la estraraj raporto kaj aldonaĵoj estis haveblaj. El la multaj diskutoj en tiu ĉambro rezultis kelkaj menciindaj decidoj: en la estrarelektoj Günther Becker, elektite ĝenerala sekretario de UEA, cedis sian lokon al Ivo Osibov. Pro liaj meritoj dum la okjara gvidado de TEJO la Komitato elektis lin la unua Honora Prezidanto de TEJO.

Sub gvido de Ivo, la nova estraro:

Simeon Simeonov kaj Humphrey Tonkin, vicprezidantoj; Carlo Minnaja, ĝen. sekretario; Ulrich Lins, kasisto; Sv. Zlatnar, Y. Umeda kaj M. Pietrzak, membroj, energie ekpaŝis delegante kelkajn esencajn taskojn al komisionoj. Tial nun ekzistas: Afrika komisiono (resp. C. Minnaja), komisiono pri NEO (resp. H. Tonkin), komisiono pri lernejoj (resp. Sv. Zlatnar), pri ekstereŭropaj aferoj (M. Pietrzak), kaj pri la Jaro de Internacia Kunlaboro (Ivo Osibov).

kaj cetere mi opinias...

Ne, ni ne parolis iel ajn pri detruo de Kartago. La temoj por la oratora konkurso nur enhavis "milito, ĉu solvilo por internaciaj konfliktoj" – temo elektita de la ĉefpremiito Francisko Simonnet –, "kion mi ne ŝatas pri Nederlando" (elektita de Aŝvini-kumar' kaj de Terence Watts, la dua kaj tria feliĉuloj), "la taglibro de Anne Frank – kiel ĝi al mi impresis", k.a.

Entute partoprenis 6 junaj talentoj, kiuj plene konservis la reputacion de tiu ĉi grava programero.

Kaj cetere... estas tiom da aferoj raportindaj: la filmoj, la orgenkoncertoj, la futbalmaĉo (ni fieru pri la du poentoj, kiujn kaŭzis nia heroo teamo, kaj ni flankenlasu tiujn diablajn ses poentojn de niaj Broek-aj kontraŭuloj), la muzeoj, la granda sukceso de Studenta Esperanto-Kabareto el Zagreb, la dancado, la Granda Ekskurso, kaj fine: la multaj internaciaj amikiĝoj kaj interkompre-

niĝoj kiuj etendiĝis en la terenon de la intimo. Kiom da edziĝproponoj ekestis mi ne scias, kaj diable! Tio memorigas min pri Ĉeĥov, kies Edziĝproponon surscenigis la Internacia Arta Teatro. Ankaŭ Pirandello kaj Matkoviĉ ŝuldas multan dankon al tiu artokolektivo, kiu tiel mirinde kaptegis la atenton de la kongresanoj per verkoj de tiuj tri aŭtoroj.

Kara Miss Violina Esperanto, pardonu ke vi venas kiel lasta en mia memoro, sed samtempe mi nun kaptu la okazon kaj prezentu vian ĉarmon kiel simbolon por tio, kion ni travivis dum tiu semajno en aŭgusto: la kongretiĝon de internacia kunvivado.

"KONGRESO DE ESPERANTO" estas la surskribo de 5 slogantukoj el verda ŝtofo kun blankaj literoj, kiujn fabrikigis LKK de la 20-a IJK por pendigo en Amsterdam kaj Broek-in-Waterland. Nun tiuj tukoj (formato 600 × 50 cm) estas disponeblaj por aliaj kongresoj kontraŭ modesta pago. Pliaj informoj ĉe la sek., 20-a IJK.



Ankaŭ de la KONGRESLIBRO restis kelkaj ekzempleroj. Nekongresintoj, rapidu kaj ekposedu tiun ĉarman libreton kun multaj kontribuoj pri Nederlando. Ĝi pli valoras ol la modesta prezo de 1 ned. gld. Mendoreso: sekr. 20-a IJK, Kastelenstraat 231. Amsterdam.


Dankon, Ivo!

Dum multaj jaroj la junaj (kaj verŝajne ankaŭ nejunaj) legantoj de la Juna Vivo povis ĝui tiun rubrikon dank' al la redakta laboro de Ivo Osibov. Sendube tiu laboro ne ĉiam estis facila, nek ĝi alportas altajn distingojn pro brilaj sukcesoj. La plej brila sukceso ja estas, ke LJV aperu regule, konstante bonkvalita, kiel modesta utilaĵo. Nun Ivo fariĝis kolego de la alia Ivo, kaj pli grandskalaj taskoj devigis lin cedi la redaktadon al nova redaktoro, kiu ĉi-kune prezentiĝas: Hans Bakker, estrarano pri informado de la Nederlanda sekcio de TEJO. Li kaj sendube ĉiuj legantoj deziras al prezidanto "Ivo de TEJO": dankon, kaj multan sukceson en la nova funkcio!

Ĉu vi jam posedas LABOREMO-n?

"Laboremo" estas la titolo de bela agendo, en kiu vi povas noti ĉiujn farendajojn (rendevuoj, kinejaj vizitoj, repagoj de ŝuldoj, eĉ lernejoj taskoj) de sept. 1964 ĝis la fino de 1965. Ĝin ilustras belaj fotoj pri verkoj de junaj Nederlandaj artistoj. Grandioza donaco por la proksimaj festotagoj. Kostas 3,50 ned. guld. kaj estas havebla ĉe sekr. 20-a IJK, Kastelenstraat 231, Amsterdam.

Francisko Simonnet,
premiito en la
oratora konkurso



Duelo de fotistoj

DELEGITOJ

Brazilo

Rio Grande FD: (Religio: spiritismo): vakas.

Britujo

Pickering D: vakas.

Ĉeĥoslovakio

Havlíčkův Brod (Čechy). 14.000.

FD (Fervojoj): Ing. J. Řebíček, fervoja konstruig., Humpolecká 208.

Danlando

Herning D: la antaŭa VD.

Finnlando

Maaria D: vakas.

Francujo

Tourcoing D: la FD (Numismatiko).

VD: s-ro A. Vinckier, pensiulo, 69 Rue du Dahomey.

Hispanujo

Madrid D kaj FD (Blinduloj): vakas.

SanMateo D: vakas.

Islando

Kópavogur D kaj FD (Literaturo): vakas.

Japanujo

Kameoka JD: s-ro Y. Umeda, sekretario, Redakcio de Oomoto; tel. 760 (tage).

Tôkyô FD (Bankaj aferoj): vakas.

Tomakomai (Hokkaidô) 80.000.

D: s-ro A. Hošida, elektroteknikisto, Ōzi Seibu 2-56.

Jugoslavio

Primošten D kaj FD (Turismo): vakas.

Kanado

Edmonton D: vakas.

Madagaskaro

Tananarive JD: vakas.

ESPERANTO EN RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu "Esperanto" 1963, p. 117 (junio). Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ciutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.27m. (7270 kcs), 41.18m. (7285 kcs), 31.50m. (9525 kcs), 31.45m. (9540 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	19.00-19.25	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 39.11m. (7670 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	23.30-23.55	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 41.35m. (7255 kcs). P.
Lundo	6.15- 6.30	Gdansk, 230m. (1304 kcs), I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk.
	12.10-12.20	Bern, 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 19.67m. (15255 kcs), 19.60m. (15305 kcs), 13.94m. (21520 kcs) (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C., Giacomettistr. 1, Bern, Svislando.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	15.00-15.15	Valladolid, 203m. (1475 kcs), K.I. Radio Valladolid, Hispanujo.
	16.50-17.00	Wien, 577m. (520 kcs). 514m. (584 kcs). 293m. (1025 kcs). 25.45m. (11785). P. Radio Wien Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma, 50.34m. (5960 kcs), 41.24m. (7270 kcs), 31.33m. (9570 kcs). P. Radio Roma, Esperanto Fako, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	12.10-12.20	Bern. Kiel lunde, (S-ro C. Gacond).
	17.45-18.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m. (5990 kcs), 30.71m. (9770 kcs), 25.10m. (11.950 kcs), 16.78m. (17.880 kcs). K. I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	18.45-19.00	Resende, 1961m. (153 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
Ĵaŭdo	17.50-18.00	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (nur la lastan ĵaŭdon de la monato).
	20.30-20.45	Volta Redonda, 1560m. (192 kcs). P. Radio Siderurgica Nacional ZYP 26, Volta Redonda (Rio de Janeiro), Brazilo.
	21.15-21.25	Bern 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 25.61m. (11715 kcs), 19.60m. (15305 kcs). P. (D-ro A. Baur).
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439m. (683 kcs), 48.78m. (6150 kcs). P. (programo de Radio Zagreb).
	23.00-23.10	Valencia, 193m. (1554 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Vendredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.45-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs), P., V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	9.45-10.00	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo.
	16.00-16.30	Guatemala, 220m. (1360 kcs), 48.54m. (6180 kcs), 30.75m. (9760 kcs). I.K. Radio Nacional TGW, Guatemala Cd., Mezameriko.
	19.00-19.15	Teresina, 259m. (1160 kcs), 62.56m. (4795 kcs). P. Radio Pioneira de Teresina, Rua Teodoro Pacheco 1179, Teresina, (Piauí). Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaŭde. (S-ro C. Gacond).
	22.00-22.30	Uberlândia 191m. (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

Monako

Monte Carlo FD (Filatelio): s-ro L. Vannini, ŝtatoŝtato, 17 rue Florestine.

Nederlando

Amstelveen (distrikto Amsterdam) 54.000.

FD (Maristaj aferoj): s-ro K. Ruig, mar-oficiro, Spurgeonlaan 122; tel. K2964-18609.

FD (Sporto: ĵudo): la FD (Maraferoj).

Nov-Zelando

Vicĉefdelegito: s-ro A. G. Wiltshire, eksŝpar-bankoficisto, 32 Muripara Ave., Point Chevalier, Auckland, W. 3; tel. 85640.

Johnsonville FD (Hortikulturo): vakas.

Lower Hutt D: s-ro M. E. Potts, poŝtoŝtato, 46 Frederick St., Avalon; tel. 691-948.

FD (Edukado): s-ino L. Wills, eksinstruistino, 6 Stellin Street; tel. 68-107.

FD (Humo artefarita): la D.

Pinehaven FD (Religio: Budhismo): la D.

Wanganui FD (Geografio): s-ro J. B. Whalley, instruisto, 3 A Kells Ave., Aramoho; tel. 37-139.

Wellington VD: s-ro T. J. Higgins, em. oficisto, 75 Moorefield Rd., Johnsonville; tel. 75-214

FD (Filatelio): s-ro H. W. R. Petersen, arma oficio, 180 Onepu Rd., Lyall Bay, E. 3; tel. 79-237.

FD (Humo artefarita): vakas.

FD (Poŝto-telegrafo): s-ro S. M. Moss, poŝtisto, Accounts Branch, G.P.O.; tel. 54845.

Pollando

Kostrzyn D: vakas.

Kraków-Nowa Huta D: vakas.

Portugalujo

Leiria D: vakas.

Sovetunio

Ivanovo D: vakas.

Krasnodar D: vakas.

Kujbyŝev D: vakas.

Moskva VD (Jugo-Zapad) & FD (Dentista): vakas.

Tbilisi D kaj FD (Elektro): vakas.

Sudaŝtato

Durban D kaj FD (Konstruado): vakas.

Svedujo

Gävle D: vakas.

Hällabrottet VD: vakas.

Klippan D: vakas.

Lund JD: vakas.

Sundsvall VD: vakas.

Urugvajo

Montevideo FD (Studentaj aferoj): vakas.

Usono

Bethesda D: d-ro T. A. Goldman, ekonomiisto, 7008 Millwood Rd.; tel. 01 6 8124.

FD (Medicino: psikiatrio): vakas.

FD (Statistiko): la D.

Cicero D: vakas.

Los Angeles FD (Rotario): vakas.

New Orleans D: vakas.

Roselawn FD (Naturismo): vakas.

San Francisco FD (Popoldanco): vakas.

Santa Monica D & FD (Religio): vakas.

Springfield VD & FD (Agrikulturo): vakas.

Warren (Ohio) 60.000. D: s-ino E. McGrogan, domestrino, 2109 Parkwood Dr., N.W., Warren, Ohio 44485; tel. 399-3742.

Wilmington D: vakas.

Abonu la monde konatan bildrevuon

la Praktiko

"la gazeto, kiu instruas kaj amuzas"

— alloga aranĝo, ilustritaj artikoloj pri ĝeneralaj temoj, tre taŭga legaĵo por komencantoj kaj progresantoj. Abonigu viajn kursanojn!

Nun akurate aperanta ĉiumonate

Redaktas: S-ino E. Burgler-Jezsó

Eldonas UEA

Abonprezo 1964: 8,— gld. (32 st.) 1965: 10 gld. (40 st.) Pagojn akceptas la kutimaj perantoj de UEA kaj UL.

KIAM VI FARAS DONACON

elektu tion, kion vi mem plej ĝoje ricevus. La luksa, grandformata eldono de la Dia Komedio de Dante kun la famaj ilustraĵoj de Botticelli (nur 36,— gld - 144 st) estas donaco neforgesebla. En la librolisto de UEA vi trovos idealan donacon por ĉiu persono kaj okazo.

Kaj samtempe vi helpas kreskigi la literaturon!

DISTRA KOKTELO

por vojaĝantoj kaj aliaj

humura libro kun multaj ilustraĵoj

128 paĝoj 12 steloj + afranko 10%

Mendu ĉe UEA aŭ ĉe la organiza komitato de la "Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965"

Wien XV, Fünfhausgasse 16, Aŭstrujo

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

350. Ribeiro, D. P. Brazilo; 351. Grabau, f-ino M., Germanujo; 352. Diez Sanz de Andino, s-ro S., Hispanujo.

DONACOJ AL GENERALA KASO

Hilland, s-ro J., Germanujo: 2,65 gld. Schweitzer, s-ino Lina, Germanujo: 0,90 gld. Vogelmann, s-ro Bruno, Germanujo: 0,90 gld. Woestemeyer, s-ro Hugo, Germanujo: 0,90 gld.

FONDAJO AZIO-AFRIKO

Heek, s-ro G. van, Nederlando: 100,— gld.

FONDAJO CANUTO

Dalmau, s-ro Delfi, Barcelona: 2,50 gld.

FONDAJO DOMO

Argentina Esperanto-Lernejo, Rosario: 4,— gld.

FONDAJO LERNEJOJ (HELPO AL INFANOJ)

McLennan, s-ro K., Britujo: 8,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1964

Stato je la 31-a de aŭgusto

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Hispanujo	2660	2739	102,97
2. Germanujo	7141	6496	90,97
3. Italujo	4210	3797	90,19
4. Britujo	6691	5919	88,46
5. Francujo	7752	6789	87,58
6. Danlando	3099	2699	87,09
7. Svedujo	7180	6175	86,—
8. Nederlando	5975	5100	85,36
9. Belgujo	2055	1740	84,67
10. Brazilo	3694	3121	84,49
11. Usono	4526	3655	80,76
12. Norvegujo	1755	1355	77,21
13. Svislando	2459	1755	72,18

14. Finnlando	3160	2275	71,99
15. Japanujo	3690	2345	63,55
16. Jugoslavio	5375	3210	59,72

Konkurso II

1. Argentino	810	690	85,19
2. Aŭstralio	1475	1253	84,95
3. Kanado	842	702	83,37
4. Islando	250	205	82,—
5. Portugalujo	485	370	76,29
6. Aŭstrujo	1430	1075	75,17
7. Novzelando	1481	1005	67,86
8. Madagaskaro	250	166	66,40
9. Sudafriko	250	135	54,—
10. Israelo	460	215	46,74
11. Urugvajo	250	75	30,—

Vidu la regulojn sur paĝo 38.

anoncetoj

Ĉu vi ion perdis dum la 49-a UK en Hago? Pluraj objektoj, i.a. gantoj, pluvmanteloj, okulvitroj, kaj ruĝa ŝalo, troviĝas nun en la Centra Oficejo. La perdintoj alskribu!

Kial alturni ankaŭ la alian vagon? En ĉi tiu fotopresita prelego Martinus traktas la demandon, ĉu toleremo estas naivaĵo. (Prezo 2 int. respk.) Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariensdalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

43 gelernantoj (2 klasoj) kaj la E-klubo kore petas vian bele afrankitan bildkarton por letervesperoj en decembro, januaro kaj februaro. Dankon! Esperanto-Klubo, Informservo, Herm. Behrmann, 303 Walsrode, Memelstrasse 14, Germanujo.

Unika Muziko el Novzelando. Ekzemploj de la unika kaj plaĉa muziko de la maoria raso sur du 45 t.d.m. diskoj estas nun haveblaj kontraŭ antaŭpago ĉe la Novzelanda Esperanto-Asocio, Postkesto 181, Upper Hutt, NovZelando. Prezo 25 steloj (12s. 6 d. angla).

Letervespero (februaro 1965). Manĝante, ĉu vi trinkas? Kia estas via trinkaĵo? Por ni, vino produktita ĉirkaŭ nia urbo. Skribu laŭ tiu temo al: Esperanta Grupo, 5 Rue Docteur Roux, Montpellier, Francujo. Ni dankeme rekompencos.

Informojn pri la katolika religio oni povas senpage ricevi de la Internacia Katolika Informejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Sendu al mi 50 aŭ pli da poŝtmarkoj de via lando kaj mi sendos la saman kvanton da nederlandaj markoj. D. J. Haverman Dzn., G. v. Amstelstraat 121, Hilversum, Nederlando.

Interŝanĝas poŝtmarkojn tutmonde kvanton kontraŭ kvanto. D. J. Haverman Dzn. G. v. Amstelstraat 121, Hilversum, Nederlando.

Ĉar mi jam multfoje oferis per kolektado de valoraj uzitaj poŝtmarkoj por nia kara movado kaj eĉ pasintan monaton 300 guldenojn por diversaj celoj, sekve mi esperas emfaze nun ke vi ĉiuj, kie ajn vi loĝas en la mondo, ankaŭ iaforme subtenos la movadon, ekzemple per kolektado de valoraj uzitaj poŝtmarkoj inter viaj gesamideanoj kaj gesimpatiantoj por poste sendi la tutan kvanton al Sinjoro P. Zacho, Fredensgade 9, Espergaerde, Danlando.

Kontrolkomisiono pri lernolibroj celas apogi la verkadon de bonaj lernolibroj. La Komisiono trastudas la manuskriptojn kaj donas eventualajn konsilojn kaj rekomendojn. Adreso ĉe: E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

La Loka Kongresa Komitato de la Kanada Kongreso de Esperanto deziras danki la multajn sendintojn de ekspozicia materialo por la kongreso en junio en Ottawa, kiu brile sukcesis.

Studento deziras, vivante kun familio, labori, plibonigi la francan en Francujo. Peter Laufen, 5102 Würselen, Kaiserstrasse 138, Germanujo.

Prelegu al ne-esperantistoj per diapozitivoj, kiel jam faras 100 kluboj en la mondo. Petu informojn de Lentaigne, 3, av. de la Gaillarde, Montpellier, Francujo. Opinio de S/B (Norvegujo) ... "Guste tian *vivan* prelegon mi sopiris".

Germana Esperanto-Kongreso Pentekoston 1965 Düsseldorf, Herzogstr. 79, sendas, por kvar int. respk., belafrankitan leteron, 36 glumarkojn kaj esperantlingvan prospekton.

Malalta prezo kaj bela donaco
por abonantoj de

EL POPOLA ĈINIO, 1965

la sola informriĉa, multe ilustrita kaj bela Esperanta gazeto el Ĉinio

Abonprezo: por unu jaro	2,50 gld.
por du jaroj	3,80 gld.
por tri jaroj	5,00 gld.

Donacoj:

1. Por ĉiuj abonantoj
Grandformata multkolore presita **ESPERANTA KALENDARO**
1965 en 12 folioj kun belaj bildoj
2. Por ĉiuj varbantoj
16 KOVERTOJ KAJ 32 LETERPAPERROJ kun ĉinstilaj pentraĵoj

Limtempo:

de 1 Okt. 1964
ĝis 31, Jan. 1965

Rekomendu al ni viajn amikojn (kun adr.), kiuj ankoraŭ ne scias pri EPĈ, por ke ni sendu al ili senpagajn specimenojn.

Abonu ĉe: UEA, ĝiaj perantoj en diversaj landoj aŭ rekte ĉe ni.

Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo

P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Aŭtunaj Internaciaj Feriaj Esp-Kursoj

en Vejle, Danlando, okazos ĉi-jare 18.-25. de okt. en Sporta Altlernejo, tre bela regiono. Unu- kaj du-personaj ĉambroj kun plena pensio. Kursoj elementa (naturmetoda), perfektiga kaj konversacia. Detala programo havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9
Aabyhøj, Danlando

La plej fama verko de



IBSEN: PEER GYNT

Drama poemo kun
komentario kaj tri
popolfabeloj.
El la norvega lingvo
tradukis E. A. Haugen.
Prezo: bind. 8 gld.,
broŝ. 6,30 gld.

Eldonis: ELDONA RONDO, boks 109,
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando



– Kiam mi estos plenaĝa, mi fariĝos piloto. Mi ĉirkaŭflugos Afrikon en unu horo..... Mi flugos al Japanujo kaj Ameriko.... kaj iun tagon mi eĉ flugos al la luno!

Paciencon, mia knabo, paciencon! Via fantazio kurigas vin tro rapide. Nur longjara, pena laborado povas realigi viajn revojn.

– Sed, mi volas fariĝi elstara piloto. Neniam mi riskos ion ajn kaj post ĉiu flugo mi alterigos sekure miajn pasaĝerojn kaj kunnavigistojn.

Bonege, junulo. Kaj kiam via revo efektiviĝos, tiam memoru, ke, alte en la aero kiel ankaŭ surtere, Philips plifaciligas vian taskon dank' al la plej fidindaj elektronikaj ekipaĵoj: radio-sendiloj kaj riceviloj, telegrafoj, signal-stacioj, ĉiuspecaj instrumentoj por esplorado kaj elprovado, instalaĵoj de radaro kaj lumigado:

Tiam, samkiel nuntempe, Philips helpas por fari nian mondon pli loĝinda. Tiam, samkiel nuntempe, Philips konservas la spiriton, kiu faris ĝiajn produktojn mondfamaj por sekureco kaj fidindeco, jam pli ol sepdek jarojn.

Hodiaŭ - kaj estontece - rigardu al

